NATIONALBIBLIOTHEK
Zeitschriftensaal.

5-a Jaro. N-o 260 APERAS 

SEMAJNE 26. Septembro 1929

ESPERANTO JE LA SERVO DE L' TUTMONDA PROLETARO

SENNACIULO

OFICIALA ORGANO DE SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA

REDAKTEJO: 14, avenue de Corbéra, Paris-12e
Gvidanto: E. Lanti

SIDEJO de Plenum-Komitato de SAT
23, rue Boyer, Paris-20e

ADMINISTREJO: Kolmstr. 1, Leipzig O 27
Administranto: R. Lerhner

KIO ESTAS LA IWW?

Malkaŝema klarigo pri ĝiaj principoj, celoj kaj metodoj

En la lastaj n-oj de "S-ulo" ni prezentis al la Legantaro ekstraktojn el sensacia verko de Filips pri la laborista problemo en Usono. Fakte en la nuna momento, kiam la opinioj pri vivkondiĉoj kaj laboro de l' proletoj en Usono estas tiom diferencaj eĉ en niaj vicoj, ŝajnas tre necese konigi al la SAT-anoj serion da dokumentaj artikoloj pri la problemo. Ĉiu el niaj legantoj havos tiel la eblon formi al si opinion.

En la publikigitaj ĉapitroj pri mastra diktatoreco kaj arbitro en Usono tre ofte oni povis renkonti la nomon de revoluciema organizo IWW (Industriaj Laboristoj de la Mondo) en rilato kun abomenaj persekutoj kaj subpremaj agoj. Multaj ĉe tiu legado estos ekdemandintaj sin, kiaspeca estas tiu organizo tiom nekonata en la eŭropaj laboristaj rondoj. Nu, ni antaŭnelonge ricevis de usona SAT-ano tradukon, kiu klarigas koncize celojn kaj principojn de tiu organizo tiom kruele persekutata de la usona kapitalistaro. Ĉi tiu traduko prezentas kvazaŭ la logikan kompletigon al la antaŭa artikol-serio, helpante klarigi la formojn kaj metodojn de la laborista klasbatal-movado en Usono. Ĝi tial sendube trovos same bonan akcepton ĉe niaj legantoj kiel la antaŭa pri-usona materialo. Red.


1. La IWW[1]

Preskaŭ ĉiu en Ameriko estas aŭdinta aŭ leginta, pri la organizo nomita LA INDUSTRIAJ LABORISTOJ DE LA MONDO, aŭ la IWW, kiel oni komune nomas ĝin, sed tre malmulte da personoj scias, kion ĝi reale prezentas kaj kion ĝi volas realigi. Ĉirkaŭ la nomo "IWW" elkreskis vasta rikolto da miskomprenoj. La gazetaro de la lando estas doninta al la IWW staton en la publika opinio, kiu tre malmulte akordas kun la faktoj. Tial ni estas certaj, ke vi interesiĝos je aŭtoritata klarigo pri la principoj, celoj kaj metodoj de la organizo, tiom kiom pri aliaj trafai faktoj.

[1] Noto de la tradukinto: Elparolu la literojn "IWW" kiel "IŬŬ".

Kelkaj miskomprenoj pri la IWW

La opinio estas komuna inter la ĝenerala publiko, ke la IWW estas sekreta organizo; ke ĝi ĉefe konsistas el eksterlandanoj; ke ni estas organizo konspir-



La subskribo kun la 3 komencliteroj de l' organizo (IWW) signifas tradukite: "Mi volas venki".

anta en la mallumo por fari perfortagojn kaj elverŝi sangon, detrui vivojn kaj posedaĵojn, kaj, fine, renversi la Usonan Registaron! Estas grandaj kaj potencaj organizoj en tiu ĉi lando, kiuj faras el tio sian specialan okupon, krei tiajn miskomprenojn pri la IWW.

La IWW tute ne havas ion por fari kun politika revolucio, nek kun politika agadoj, kiel vi facile komprenos, kiam vi estos leginta plue. Ni ne demandas viron pri liaj politikaj opinioj, ne pli ol ni demandas lin pri lia religio, aŭ kia estas la koloro de lia haŭto. Tio ne interesas nin. Ni estas nuligintaj ĉiujn tiajn enklasigojn inter niaj kunhomoj. Fakte, tiom neinteresataj ni estas, kiel organizo, je politikaj, religiaj aŭ rasaj problemoj, ke ni ne permesas tian propagandon en nia organizo, kiu tendencas fortiri la atenton for de niaj celoj kaj alkonduki al malpacado kaj disrompiĝo.

Ni enklasigas, anstataŭe, niajn kunulojn laŭ ilia ekonomia stato en la socio, en kapitalistan aŭ parazitan klason, kaj laborulan klason. Ni centrigas nian atenton sur demandon, kiu egale koncernas ĉiujn, nome, la ekonomian demandon, donante pasantan atenton al aliaj demandoj nur kiam aliaj fluoj transpasas nian vojon kaj malhelpas nian laboron, aŭ por pure edukaj celoj, sed neniam por propagandi por unu partio, kredo aŭ raso prefere al alia.

La IWW estas revolucia Labor-Unuiĝo

La iniciativo por formi la IWW-on komenciĝis en 1904, sed la formado de la nova labor-unuiĝo efektiviĝis ĉe granda kunveno en Ĉikago (Chicago) en 1905, kiam la principoj, celoj, metodoj kaj strukturo de la organizo deklariĝis kaj aprobiĝis, restante neŝanĝitaj ĝis hodiaŭ mem laŭ tutaj siaj ĉefaj trajtoj. La IWW fariĝis laborunuiĝo tiam, kaj tia ĝi estas restinta ĝis nun. Iu, kiu provas diri al vi alion, misreprezentas ĝin. La-anoj de tiu ĉi ekonomia movado ne havas siajn okulojn sur la registaraj domegoj, kiel la politikaj partioj, sed sur la fabrikoj, muelejoj, laborejoj kaj aliaj lokoj de la produktado kaj dissendado. Ni ne diferencigas inter la enlanda usonano rajtigita voĉdoni kaj la eksterlandano, kiu ne havas tiun rajton. Ĉiu, kiu laboras por salajro, ĉu viro, virino aŭ infano, estas inda aniĝi kaj havas la permeson voĉdoni en la unuiĝo.

La IWW estas industria Mond-unuiĝo

La fondintoj de tiu ĉi nuntempe mondfama laborunuiĝo donis al ĝi la nomon LA INDUSTRIAJ LABORISTOJ

DE LA MONDO, tiel montrante, ke la celo de la organizo estas unuigi ĉiujn industriajn laboristojn de la mondo en unu anaron. Tiu celo ankoraŭ ne estas efektiviĝinta, sed la limoj de ĝia influo etendiĝas ĝis malproksime. Administrejoj estas formitaj en Anglio, Aŭstralio kaj Sud-Afriko; en Meksikio, Argentino kaj Ĉilio; en Skandinavio kaj aliaj landoj. La ĉefa pretendo de la IWW por esti mondunuiĝo, estas tamen bazita sur la fakto, ke ni estas influintaj forte aliajn laboristajn organizojn kaj estas instigintaj ilin alpreni nian programon aŭ spirite aŭ laŭlitere.

Kvankam la nuntempa kotizpaganta membraro estas malpli ol centmilo en Usono, ni estas potenca mondforto. Oni estas disdoninta pli ol milionon da membro-kartoj, kaj niaj membroj nun troviĝas en ĉiuj landoj sub la suno. Oni trovas ilin en la minejoj en Ŝpicbergen proksime al la Norda Poluso. Ili troviĝas ĉe la balenstacioj en Sud-Georgio, en la direkto al la Suda Poluso. Vi povas trovi ilin en ĉiu ŝipo sur la maro, portante la semon de nia propagando al ĉiuj havenoj kaj plantante ĝin en fruktodona tero sur malproksimaj marbordoj.

Nuntempe, kiam ĉiaj aliaj sociaj teorioj estas malsukcesintaj kaj donas nenian promeson estontan, la IWW staras sole en la pensoj de la laboristoj tra la mondo kiel la estro de la situacio. Laŭ tiu senco la idealo de la fondintoj estas efektivigita. Nun restas transplanti la ideon el la cerboj de la laboristoj en la teron de la industria vivo, kaj la ideo de la fondintoj estos kompleta realo. Kun la helpo de la industriaj unuiĝanoj en la aliaj landoj ni esperas realigi tiun ĉi projekton, baldaŭ formante INDUSTRIAN MONDUNUIĜON.

2. La IWW-Historio skribita per sango

De la komenco la IWW konsistis precipe el okcidentaj ministoj, metallaboristoj, fervojistoj kaj migrantaj laboristoj. En la kuro de la jaroj ĝi etendis sian agadon al kelkaj industrioj kaj havas nun 29 Industriajn Unuiĝojn naciajn. Kaj unu, la Industria Unuiĝo de la Transportistoj de la Maro, eĉ nun provas atingi internacian superregadon. Tiujn ĉi Unuiĝojn vi trovos vicigitaj pli poste. Granda parto de la membraro konsistas el migrantaj laboristoj, kaj la unuiĝoj plej fortaj estas tiuj formitaj de la ministoj, la lignaĵistoj, la terkulturistoj, la konstruistoj, la mar-transportistoj, la metalistoj, la tekslaboristoj kaj la fervojistoj.

La organizo estas kondukinta multajn grandajn kaj negrandajn strikojn en multaj industrioj kun varia sukceso antaŭe, sed lasttempe kun tre granda sukceso. Pli ĝuste la IWW estis sukcesplena en la plibonigado de la migrantaj laboristoj en la terkultura, mina kaj lignaĵa industrioj, kaj ankaŭ la martransportistoj kaj la getekslaboristoj estas akirintaj grandajn profitojn sub la flago de la IWW. Antaŭ la apero de la IWW, kaj dum ĝiaj unuaj jaroj, la sorto de la migrantaj laboristoj, kiuj ĉirkaŭvagis la landon kun siaj lankovriloj sur la dorso, estis senespera. Se viro unufoje estis falinta en iliajn vicojn, restis malmulte — aŭ neniu espero por li, iam denove leviĝi socie. Li estis efektive "Down and out". (NT. Angla frazo signifanta: malsupren kaj for.) Estas malsame hodiaŭ — dank' al la IWW. Tiuj laboristoj nun havas esperon, memrespekton kaj povon pro ilia organizo.

Sed ni ne povas paroli detale en tiu ĉi nelonga klarigo.

Nature, la ĉefa agado de la organizo ĝis nun estis e d u k a. Ĉe la plenumado de tiu ĉi laboro ĝi multfoje estis en konflikto kun la estraroj pri libera parolrajto, presrajto kaj kunvenrajto.

Tradukis SAT-ano 1781.

laŭ 3-a reviziita eldono de samtitola broŝuro publikigita de IWW 555 W. Lake St., Chicago, Ill., Usono.

ALIA "SAKKO-VANCETI"-AFERO EN USONO

(Fino. Vidu antaŭan n-on)

La strikantoj de Gastonia antaŭ la tribunalo

Pli kaj pli evidentiĝis, ke la strikantoj ne estos defendataj de la polico kontraŭ la atakoj de la banditaj agentoj de la kompanio. Male, la polico ankaŭ atakis ofte la tendaron de la strikantoj. Pro la teroro multaj gestrikantoj eklaboris en la fabriko kun la firma kredo, ke ili denove ekstrikos baldaŭ. Post la 5-a de junio la aktiveco de la strikantaro plivigliĝis. Multe da gelaboristoj denove ĉesigis la laboron. Sed ankaŭ la atakoj de la polico plioftiĝis kaj sangiĝis. Multe da strikantaj virinoj, geknaboj estis kruele batataj. En la tuta striko tamen la provokantaj agentoj de la kompanio havas la plej abomenindan rolon. Foje iu kompania agento pafis sur K-don Fred Bil (Beal), la organizanton de la Sudaj tekslaboristoj. Lastmomente strikanto batis la brakon de la agento; sekve la kuglo trafis la tergrundon. La fabrikestroj faras ĉion por efektivigi la areston al K-do Fred Bil je kia ajn kosto. La strikantaro estas senĉese provokata. La plano de la fabrikestroj estis detrui la tendaron de la strikantoj kaj forpeli la gvidantaron de la gestrikantoj el Gastonia. Por povi rezisti la atakadon, fine la strikantoj estis devigataj iel armi sin, ĉar la "Justeca Leĝaro" usona ne protektis, sed male atakis iliajn rajtojn.

Policestro, s-ro Aderholt decidis energian likvidon al ĉi tiu striko. Li kun 4 policoficiroj veturis aŭtomobile en la tendaron de la strikantoj. Tendar-gardisto demandis ilin: "Ĉu vi havas aresteteron"? "Ni ne bezonas tion", unu el ili respondis. Tiam 3 policoficiroj atakis la tendar-gardiston. Ĵetinte lin sur la teron, la policoficiroj piedbatadis lin, ĝis kelkaj strikantoj alvoke kriis al ili: "Liberigu lin." Policoficiro ekfuriozis pro ĉi tiu alvoko, kaj li per pafo vundis strikanton. Granda tumulto, interpafado sekvis, en kiu la policestro Aderholt grave, kaj unu strikanto kaj tri policoficiroj negrave vundiĝis.

Mortminaco al 15 strikantoj

Polica forto estis alarmata. Teroro ekregis pli draste en la urbeto, kiu aspektis kvazaŭ en senviva stato. Oni pelis, ĉasis la strikantojn, tute kiel sovaĝajn bestojn. Pli ol cent gestrikantoj estis arestataj. Por konfesigi oni turmentis la arestitojn per larmogaso. Banditaj agentoj de la fabrikestroj eĉ faris planon por linĉi la arestitajn gegvidantojn de la Nacia Tekslaborista Unio, kiu lab. organizo batalas por la interesoj de l' usona tekslaboristaro. La burĝaj ĵurnaloj en Gastonia kaj en tuta Usono postulas la mortkondamnon al 15 tekslaboristoj. La ĵurnalo "Gastonia Gazette" publike alvokis la juĝistaron por mortkondamni "ĉi tiujn malbenitajn bolŝevikojn". Ĝis nun iom post iom granda parto de la arestitoj (ili nombris pli ol 100) estis liberigata je kaŭcio de 2000 dolaroj po unu.

Arestitaj restis 23 grave akuzitaj Gekamaradoj, el kiuj ĵus nun kaŭze de akrega protestado de la Usona klaskonscia proletaro oni liberigis 3 K-dinojn: Vera Böŝ (Bush), Ami Ŝeŝter (Schechter), kaj Sofio Malvin, je kaŭcio de 5000 dolaroj (!) po unu. Ili ĝuas nun kondiĉan liberon provizoran. La kaŭcioj por ĉiuj liberigitaj Gek-doj devis esti deponataj de la Internacia Ruĝa Helpo, kiu financas ankaŭ la defendon de ĉiuj niaj akuzitaj Gek-doj dum la proceso. La 20 grave akuzitaj "ĉefkulpuloj" per nenia kondiĉo nek kaŭcio povas esti liberigotaj. 15 el ili laŭ ia koncerna paragrafo en la usona leĝo devos esti ekzekutataj.

Karakteriza situacio en N. Karolino

Ĉie en la tuta mondo la laboristaro devas sciiĝi pri la neaŭditaj maljusteco kaj subpremo al la usona proletaro. Nova Sakko-Vanceti-afero estas ripetota. En Usono la tuta publika opinio rekonata eĉ en reakciaj gazetoj estas, ke la nuna akuzo kaj proceso estas intrigo por venĝi sin je la strikantaro. La kapitalista justeco false akuzas por havi pretekston por murdi laboristajn gegvidantojn, "kiuj per siaj malbenitaj agitadoj incitas la kontentajn gelaboristojn al strikoj kaj ribeloj".

Renoviginte vian abonon al

SENNACIULO

via semajna esp. gazeto

ne forgesu ankaŭ la monatan literatur-scienc-pedagogian revuon de SAT

LA NOVA EPOKO

Ĉiu kajero estas 32-paĝa.

Informiĝu pri ĝia enhavo mendante prov-numeron je la prezo de **0.35 mk. g.**

Postulu abon-kondiĉojn ĉe **Administracio de SAT,** Colmstr. 1, **Leipzig O 27.**

Por karakterizi la gradon de "kontent-ebleco" ĉe la tekslaboristaro usona ni citas ĉi tie eltirojn el 2 oficialaj raportoj de "burĝaj" Komercaj Ĉambroj en Norda Karolino:

"Laborforto estas sufiĉe malalta en N. K. La horsalajroj varias inter 18, 25, 32 cendoj por spertaj tekslaboristoj. La laborleĝoj koncerne labortempon kaj noktan laboron por virinoj estas malseveraj. Ordinara labortempo semajna estas **60** horoj. Limigo por laborigi kromhorojn ekzistas nek por viroj nek por virinoj. Laŭ leĝo infanoj ne povas labori pli ol **11** (dekunu) horojn tage. La ŝtato Norda Karolino estas la plej konvena loko por instali tie fabrikojn kaj transigi ĉi tien entreprenojn el la Nordaj ŝtatoj."

Komerca Ĉambro en N. K.

La usona proletaro kolektis unu milionon da protestsubskriboj kaj sendis ilin al la juĝistaro en ĉi tiu proceso. Sed tio ne sufiĉos. Ĉie en la tuta mondo la klaskonscia proletaro devas informiĝi pri tiu ĉi proceso kaj energie mobilizi sin por protesti kontraŭ la falsa akuzo kaj maljusta proceso al la 23 Gek-doj en Gastonia.

Vivu la internacia solidareco de la Tutmonda Proletaro!

Kompilis K-do Bonesper R (29), laŭ decido de la Novjorka SAT-anaro.

La Novjorka SAT-anaro petas la legantojn de "S-ulo" traduki tiun ĉi artikolon nacilingven por enpresigi ĝin en lab. gazetoj diverslandaj. Tradukonto estas petata sendi n-on de l' gazeto nacilingva, en kiu aperos la tradukita artikolo. (Rekompencota.) Adreso: K-do Bonesper R., p. a. Modern Bookshop, 350, East 81st. str. New York City.

DU PIONIROJ FORPASIS EL LA MONDO

La 7-an de aŭgusto mortis Viktoro L. Berger, la unua socialisto, kiu fariĝis ano de la Usona Parlamento. Spite pluvo pli ol centmil personoj preterpasis honore lian korpon en la urbhalo de Milŭaki (Milwaukee) kaj sekvis ĝin al tombo. Kondolencojn sendis Brita Labor-Partio, germana kaj aŭstria socialistaj partioj.



Malbonŝance tramvagono trafis lin en la strato kaj la 69-jarulo ne povis venki sian vundon. Estas stranga koincido, ke la sola alia socialisto, kiu iam sidis en la parlamento, Mejer London, ankaŭ perdis sian vivon en veturila akcidento.

Berger naskiĝis en Nider-Rebak (Nieder-Rehback), Aŭstri-Hungario, en j. 1863. Ankoraŭ junulo 18-jara, li enmigris Usonon kaj fine fariĝis instruisto en Milŭaki en la ŝtato Ŭiskonzin (Wisconsin). Unu el la organizantoj de l' Socialista Partio, konata verkisto kaj paroladisto, li helpis kapti la estrecon de sia hejmurbo. Fakte ĝis nun socialismo estas ĉefe importo en Usono kaj radikiĝis nur inter la germanoj en Milŭaki, la tielnomataj pensilvania[1]-holandanoj en Reding kaj en la kosmopolitaj kvartaloj de la hebreaj vestfaristoj en Ĉikago kaj Novjorko. La putreco de l' politikaj partioj en Usono estas mondfamaĉa, sed Berger sukcesis purigi per socialista administrado la urbon kaj sesfoje lia distrikto elektis lin esti parlamentano. Dufoje pro lia kontraŭstaro al la milito la registaro rifuzis permesi, ke li okupu sian pozicion, ĉar per prispionada leĝo li estis ricevinta kondamnon al 20 jara malliberigo, kaj lian ĉiutagan ĵurnalon la poŝto rifuzis porti de 1917 ĝis 1921. Poste la Supera Tribunalo ("Suprem Court") nuligis la juĝon. Bedaŭrinde lastjare li ĵus perdis la elekton.

Spite sia dummilita persekutiĝo li ne konsentis je la komunista vidpunkto kaj senkaŝe diris, ke li aprobas la taktikon de Makdonald, ne de Lenin, kiam la Socialista Partio splitiĝis. Solulo en la parlamento dum la postmilitaj jaroj, li pledis por pensioj por la maljunuloj, subteno por la senlaboruloj, protekto al la sindikatoj kaj al la virinaj kaj junaj laboristoj, justeco por Debs, Muni, Sakko kaj Vanceti kaj aliaj viktimoj de l' kapitalista leĝo. Eĉ liaj politikaj malamikoj admiris lian honestecon kaj kapablon. La Usono de la morgaŭo pli multe honoros lian memoron ol la Usono de l' hieraŭo.

* * *

La mondo estas iom pli malriĉa pro la morto de Edŭardo Karpenter, mondkonata brita poeto, verkisto kaj socialisto. Li estis talenta herezulo, kiu kiel junulo edukiĝis por eniri la servon de la eklezio. Sed li ne povis akcepti la dogmojn. Multe influis lin la usona poeto Ŭalt Ŭitman (Whitman), kiu esprimis la forton, la senkaŝan ĝuon de la korpo kaj liberon de pensado, kiuj karakterizas la pionir-epokon. Karpenter penis iom imiti ankaŭ Toro (Thoreau) en sia simpla vivmaniero. Longan poemon li verkis "Al Demokratio", ankaŭ la socialistan himnon "Anglio Leviĝu". En lia verko "Civilizo: Ĝia kaŭzo kaj kuraco" li efike atakis la trompon, la nemeritan memfieron de moderna kapitalisma socio. Li helpis kun Moris (ankaŭ poeto kaj artisto) kaj Hindman (kiu unue prezentis la marksan teoriaron al angla legantaro) fondi Social-Demokratan Federacion. Li ankaŭ en "Maturiĝo de Amo" pritraktis seksajn aferojn kaj simpatie klarigis la duonvir-duonvirinan homon, kiu kredeble li mem parte estis. Lia korpo eluzita per 85 jaroj da vivado malaperos, sed la influo de liaj verkoj originalaj, pensigaj restos kiel daŭra monumento. (488)

[1] Pensilvanio estas unu el la ŝtatoj, kiuj konsistigas Usonon.

EL LA HISTORIO DE L' SOCIALISMO

19. Pri la historio de l' himno "La Internacio"

(3-a daŭrigo)

Kelkaj vortoj pri Petro Degeter. Li naskiĝis en Gent (Gand) la 8. oktobro 1848. Lia patro, fabriklaboristo, havis ok infanojn kaj laborakiris 2.50 fk. tage. La familio venas al Lil (Lille); en la aĝo de sep jaroj Petro laboras en fabriko kiel "malgranda kroĉisto". Sed post laborfino li legas, studas; li sentas sin speciale altirata al la artoj kaj la muziko kaj sekvas dum du jaroj la kursojn de la konservatorio en Lil. Post reveno de l' militservo li fariĝas lignomodlisto. Li praktikas tiun profesion en Lil ĝis 1902, epoko, en kiu li fiksiĝas en Sen-Deni (Saint-Denis). En 1921, okaze de la skismo okazinta en la vicoj de la socialista partio (S. F. I. O.) li deklaras sin partiano de la rusa revolucio, aliĝas al la komunista partio kaj estas en la nombro el delegitoj, kiuj en 1927 iras al Moskvo por ĉeesti la festojn de l' deka datreveno de la Revolucio.

Tiuj estas la du aŭtoroj de La Internacio.

Ilia verko estis kantata unuafoje en Lil, je fino de julio 1888, okaze de festo organizita de la Sindikata Ĉambro de ĵurnalvendistoj. Komence de tiu horo, kaj en la jaroj sekvantaj, ĝi disvastiĝas en Rube (Roubaix), Armantje (Armentières), Turkŭen (Tourcoing) ktp.... unuvorte en la ĉefaj laboristaj centroj de l' Nordprovincoj, kie la socialismo komencas disvolviĝi. Ĝi iras ĝis Gent. Sed ĝi ne forlasas la regionon, kaj aliloke ĝi estas nekonata.

Ses jarojn pli malfrue, la 26. majo 1894, "La Socialisto", semajna centra organo de l' Franca Socialista Partio, publikigas sub la subskribo de V. Savari (Savary) sufiĉe longan artikolon pri la verko de Potje. (Niaj Poetoj, Eŭgeno Potje). La Internacio en ĝi ne estas menciita. Ĝi estas en tia grado malmulte disvastigita ekstere, ke la proceso, kiun elvokis unu el ĝiaj reeldonoj, pasas preskaŭ nerimarkite. Jen, en kio konsistas tiu ĉi proceso:

En 1894 ano de l' lab. partio, Arman Goselen (Gosselin), eks-instruisto, sekretario de l' urbestro de Kodri (Caudry), publikigas popol-eldonon de l' verko de Potje kaj de Degeter, destinita por la K-doj de Kambrezio[1]. La prokuroro persekutas je akuzo de provoko al mortigo kaj ekscito de soldatoj al malobeo, la faman strofon:

Estrar' nin trompis artifike, —
Por ni do — pac'! por ĝi — milit'!
Rompinte la armeojn strike
Ni lasu l' vicojn sen hezit'.
Insistis niaj kanibaloj,
Ke kuraĝuloj estu ni, —
Do kontraŭ propraj generaloj
Ekpafos baldaŭ la gvardi'.

[1] Regiono de Kambre (Cambrai).

Kvankam nur temis pri reeldono, kvankam la kulpigita strofo jam prezentiĝis en la eldono Dantü (Dentu) de l'Revoluciaj Kantoj kaj en la lil-aj eldonoj de l'Internacio, Goselen estis denuncata al la tribunalo de Due (Douai) kaj kondamnata, la 11. aŭgusto 1894, je unu jaro da malliberigo (kiun li suferis en la arestdomo de Valansjen) kaj je monpuno da cent frankoj.

La kondamno de Goselen perdiĝas en la multobleco da persekutoj, kiujn la registaro Kazimir Perje-Düpüi (Casimir Périer-Dupuy) direktas tiam kontraŭ la socialistoj kaj la revoluciuloj ĉiutendencaj kaj precipe en la Nordo kontraŭ "La Laboristo" (semajna organo de l'Lab. Partio). Apenaŭ "La Malgranda Respubliko" komunikas ĝin en sia n-o de 15. aŭgusto, sur la dua paĝo, en kelkaj linioj de Pol Mink (Paule Mink) sub la titolo "Kondamno de socialisto", kiuj difinas tre ĝuste la persekutitan kanton kaj insistas precipe je la doloriga situacio de Goselen, arbitre trafita de reakcia juĝistaro kaj kruele forŝirita de sia hejmo.

Du semajnojn poste, kiam ĉe la elirejo de publika kunveno farita de Ĵül Ged (Jules Guesde) en Kale (Calais), kolekto estas proponita je favoro de Goselen, pluraj civitanoj demandas, en kio konsistas la proceso starigita en najbara departamento kontraŭ kunbatalanto de l' partio. Kaj, ekparolante, "Ged klarigas, ke Goselen estis kondamnita, ĉar li reeldonis la kanton La Internacio de l' granda poeto Eŭgeno Potje, antaŭe jam publikigita de l' presisto Dantü, kiu neniam pro tiu fakto estis kondamnata. Li aldonas, ke la strofo kondamnita de la juĝistaro koncernis, skribita sub la Imperio, al la armeoj de l' despotoj kaj ke, per tiu ĉi kondamno la burĝa justeco prenis partion por la perfiduloj kaj la reĝoj-konspirintoj, pri kiuj parolas la Marsejezo[1].

La 12-a nacia kongreso de la Lab. Partio, unuiĝinta je la 14. sept. 1894 en Nant (Nantes), voĉdonas per aklamoj deklaron, kiu entenas jenan alineon: "Al la viktimoj de tiuj ĉi amasigitaj atencoj, kiuj nomiĝas Goselen, eks-instruisto de l' Nordo, kondamnita je unujara malliberigo, ĉar li reeldonis revolucian kanton de Potje, aŭ Plekanof, trafita de eksterlandiga dekreto, la Kongreso sendas la esprimon de sia plej viva simpatio." La Internacio, oni rimarkas, ne estas nomita en tiu ĉi protesto.

En la "Socialista Junularo"[2] de majo 1895, Henriko Pekri (Pécry) dediĉas al la verko de Potje studon dekpaĝan. Li citas nombron el liaj kantoj, da kiuj li reproduktas fragmentojn. La Internacio ne prezentiĝas inter tiuj, kiuj estas cititaj.

Sed depost la sekvanta jaro la proleta himno ekfamiĝas. La 20. julio 1896 malfermiĝas en Lil (Lille) — kies urbdomo estis akirita depost la monato majo de la socialismo — la 14-a nacia kongreso de l' Franca Lab. Partio. Tiu ĉi kongreso estas unu el la plej gravaj, kiujn dum la paso de l' historio aranĝis la Lab. Partio. Proks. 200 delegitoj partoprenis ĝin. Ĉio, kion nombris la partio da spertaj kaj konataj batalantoj, ĉeestis: Ĵül Ged, Rene Ŝoven (Chauvin), Ĵurd (Jourde), Sovane (Sauvanet), Karno (Carnaud), Antid Bŭaje (Boyer),



"LA FINBATALO" de Gynla Zilzer

deputitoj; Paŭlo Lafarg (Lafargue), Delori (Delory), urbestro de Lil; Johano Dormŭa (Dormoy), urbestro, ĝenerala konsilanto de Monlüson (Montluçon); Krebs, urbestro de 'Ellem (Hellemmes); Henriko Geskier (Gesquieères), ĝeneralaj konsilantoj de l' Nordo, Aleksandro Zevaes, membro de l' nacia konsilantaro de l' partio ktp. ktp.

Krome venis de l' eksterlando Vilhelmo Libkneĥt (Liebknecht), Fiŝer (Fischer) kaj Singer, parlamentaj deputitoj, reprezentantoj de l' germana socialdemokratio; Viktoro Adler, reprezentanto de l' aŭstra socialdemokratio; Pablo Iglesias, Munoz kaj Keĥido (Quejido) de l' hispana lab. partio; Anastasiu, de l' rumana lab. partio.

Uzante kiel pretekston la alvenon de l' tri germanaj socialistoj, la reakciuloj, klerikaluloj kaj naciistoj de Lil, decidas malamikajn manifestaciojn, mobilizas siajn anojn, alvokas al la repuŝo siajn samreligianojn de l' najbaraj urboj. Siaflanke la Lab. Partio algluas sur la muroj de Lil afiŝon adresitan al la laboristoj kaj tiel konkludantan:

"Vi venos multnombre por saluti kaj aklami viajn fratojn de ekstere, proletoj kaj socialistoj kiel vi, kiuj, kiel vi kaj kun vi, batalas por la liberigo de l' Laboro kaj de la Homaro. Vi konfirmos per via ĉeesto vian volon konservi inter la popoloj tiun ĉi grandan pacon, kiu estas hodiaŭ la unua bezono kaj la unua depostulo de l' laboristoj ĉiulandaj.

"Sed inter tiuj ĉi invititoj al nia kongreso, inter tiuj ĉi gastoj de via avangarda urbo, vi salutos kaj vi aklamos dufoje Libkneĥt, la homon, kiu en 1870, kiam la respublikana Francio estis forlasita de tuta Eŭropo kaj de siaj propraj regantoj, stariĝis kun la socialdemokratoj de Germanio kontraŭ la anekso al Elzasio-Lotaringio kaj pagis per dujara enkarcerigo sian opozicion kontraŭ la dismembrigo de la franca patrio.

"Vivu la socialista urbo Lil! Vivu la Lab. Partio! Vivu la Internacio de l' Laboro kaj de l' paco!"

(Finota.)

Aleksandro Zévaes. Trad. N. B.



Amo kaj amindumo

La vortoj "amo" kaj "amindumo" havas tute malsaman sencon.

Malpermesi "amon" al SAT-anoj estus pli ol ridinde, ĉar ne ekzistas homoj, al kiu ne estas konata ĉi tiu potenca prainstinkto, iranta laŭ sia propra vojo ofte malgraŭ ĉiaj trafaj argumentoj de la racio. Estus tre kurioze ĉi-rilate fari iajn "rekomendojn".

Sed tute alia afero estas la "amindumo", t. e. amludado, flirto. Ĝin ni devas kontraŭbatali tutforte, elpeli ĝin el niaj SAT-rondoj al burĝaj medioj, kie estas ĝia vera kampo. Serioza homo — kaj tiaj ni SAT-anoj ja celas esti antaŭ ĉio — malŝatas kaj evitas ĉiajn vivludojn, precipe amludon, ĝuste pro ĉi ties ofte neripareblaj sekvoj: dum unu ludis, la alia malfeliĉiĝis por la tuta vivo.

Viro kaj virino, kamarado kaj kamaradino, aliru unu la alian fideme kaj serioze. Se evidentiĝos, ke la alproksimiĝo estis eraro — oni diru tion kun sama fido kaj malkaŝemo. Nenian ludon! Kaj kun la amindumo malaperu ĉe ni ĉiuj atributoj, uzitaj kaj uzataj ankaŭ en proletaj rondoj por reciproka nenatura allogado, penanta montri la komercaĵon de bona flanko (laŭ rusa proverbo).

Ni vestu nin belguste, sed simple kaj oportune; ni deklaru militon al luksaj vestoj kontraŭnaturaj, altaj kalkanumoj, barbaraj oraj ornamaĵoj kiel ĉiaj ringoj, braceletoj k. a. falsaj bukloj, ŝminkitaj vizaĝoj kaj pudritaj nazoj!

SAT-anino 4227

Ekzistas ankoraŭ multaj laboristaj esperantistoj, eĉ SAT-anoj,
kiuj pli malpli malatentas sian klasan devon, ĉu kunlaborante al neŭtralaj organoj, ĉu informante ilin prefere ol Sennaciulo-n, ĉu alimaniere. Tial ni kontentas sciigi, ke ree estas havebla la bonega varba broŝuro de K-do E. Lanti

FOR LA NEŬTRALISMON!
3-a eldono

plivastigita, 32-paĝa, enhavanta krom la aldonoj de la 2-a eldono ankoraŭ novan enkondukan parolon de l' aŭtoro kaj tre koncizajn kaj trafajn difinojn pri "sennaciismo, patrio, revolucio" k. a.

Prezo: 0.30 mk. g.

Havebla ĉe la Administracio:
R. Lerchner, Colmstr. 1, Leipzig O 27

[1] "La Socialisto", 8. sept. 1894, p. 4: "Ged faras malgrandan neekzaktecon, ĉar La Internacio estas aperinta post la tempo de l' milito kaj la proklamo de l' Respubliko.

[2] Monata revuo de l' scienca socialismo aperinta en Tuluz (Toulouse) sub la gvidado de Huberto Lagardel (Lagardelle) kaj de Jozefo Sarant (Sarrante). Ĝi ekzistis unu jaron.

ENHAV-TABELO
DE LA 5-a JARKOLEKTO DE SENNACIULO

A. Socipolitiko

Paĝo
La faŝisma edukado . . . 1
Papo kaj faŝismo . . . 197
El Italio . . . 313
En batalo pro la mondmerkato . . . 3
Internacia politiko k militdanĝero . . 25
Kiun signifon havas la tuteŭropa movado . . . 49
Kapitalismo super Afriko . . . 57
La vera vizaĝo de la Ligo de Nacioj 77
La minaco de Hindio . . . 149
Parlamenta reĝimo kaj karbo . . . 229
La unueco de Eŭropo estas teknika problemo . . . 157
Ĉinio kaj Eŭropo . . . 169
La lukto por aervojoj en Afriko . . . 199
La venonta venengas-milito . . . 249
Ĉu likvido de l' milito? . . 407 419 431
La internacia armado . . . 442
La nesolvita problemo de la Riparpagoj 513
La formiĝo de tutm. trustoj karakterizas la progresantan disvolviĝon de la kapitalismo . . . 393
La kalvario de la nigra raso . . . 501
La negra problemo en Ameriko . . . 139
Pro kadavro de kadavriginto (Foŝ) . 250
La batalo de l' aŭstria laboristaro . . 26
Pri la faŝismo en Aŭstrio . . . 429
Laborista kondiĉaro en Aŭstrio . . . 527
La bazo de l' novaj milit. konfliktoj en Ĉinio . . . 102
La amerika danĝero . . . 113
Pri Sandino, la granda patrioto de Nikaragvo . . . 104
El Usono . . . 105 311 372 383
La sudamerika konflikto . . . 160
Problemoj el Ameriko . . . 262
Kiel riĉaj estas la laboristoj usonaj . 263
La financa superregado en Usono . . 286
La usona imperialismo . . . 345
Strikoj en Eldorado — Suda Usono . 346
La laborista problemo en Usono (laŭ Filip) . . 417 430 442 456 470 498 503 514
Alia "Sakko-Vanceti"-Afero en Usono 526 538
El Meksikio . . . 312
El Argentino . . . 130
Lab. vivo en Argentino . . . 71
Lab. mizero en Brazilio . . . 72
Problemo de l' elmigrado . . . 499
Letero el Aŭstralio . . . 472
Kelkaj faktoj pri Ĉinia Orienta fervojo 454
El Ĉinio . . . 473
Infanlaboro en Ĉinio . . . 311
Salajro de laboristinoj en Japanio . . 265
Fortiĝo de japanaj prol. partioj . . . 383
Ŝpinistinoj venkis (Jap.) . . . 252
Letero el Persio . . . 159 171 406
El Alĝerio . . . 502
Plena demokratio (Svedio) . . . 12
El Svedio . . . 286
Konflikto en Jugoslavio . . . 18 34
Senbrida faŝismo en Jugosl. . . . 347
Nova Politika Revuo (Jugosl.) . . . 360
El Jugoslavio . . . 395
El sendependa Ĉeĥoslovakio . . . 59
Ruĝa urbeto en blankterora lando (Ruman.) . . . 313
Vivo de revoluciuloj en Polio . . . 68
La teroro kontraŭ lab. organizoj en Polio . . . 348
Plifirmiĝo de l' faŝ. reĝimo en Polio . 372
Pri pola maldekstra soc. partio . . . 458
El Litovio . . . 123
En Litovio sub la faŝismo . . . 159
La sekvoj de sendependiĝo (Litovio) 238 251 264 277
Letero el Latvio . . . 230
Nova viktimo de demokrata sociordo (Esto.) . . . 219
Iom pri ekonomia k polit. situacio en Estonujo . . . 444
El Hispanio . . . 42 50 220
Panon! Laboron! (El Hung.) . . . 199
La "nacia festo" en Hispanio . . 516 524
Vivu la neŭtraleco! (Belgio-Hung.) . . 418
Hung. labor. ne rajtas kanti . . . 432
Ministaj strikoj en Hungario . . . 239
Kontraŭ la teroro en Bulgario . . . 161
La pormilitaj elspezoj de Bulgario . . 287
Komunist-arestoj en Bulg. . . . 300
Sub la unuamaja standardo (Bulg.) . 347
Interna stato de Bulg. . . . 358
Strikmovado en Bulg. . . . 394
La klasbatala situacio en Bulg. . . . 515
Laborkond. en belga vitrofabriko . . 301
Laboristaj rajtoj en Danio . . . 529
Justeco en Francio . . . 313
Halüen la Ruĝa . . . 103
La homaj rajtoj . . . 66
La Milito venas . . . 515
La senkulpeco de Vanceti . . . 180
Senlaborula klubo en Barnsli (Britio) 58
Naciismo al lernantoj en Germanio . . 58
Germ. kapitalismo en Ruhr-distrikto . 70
Fervojista vivo en Britl. . . . 70
Kamparlab. mizero en Bavario . . . 140
Letero el Londono . . . 37
Socialismo en Islando . . . 86 95
Vojdisiĝo . . . 182
Mobilizi . . . 181 232 244 291
Kaŭzo de senlaboreco en Kassel . . . 335
Kiel laboristoj plendas en Germ. . . . 472
Flandrio al la flandroj . . . 52
Por la sendependeco de Flandrio . . 180
La Flandra movado . . . 455
Floras la blankrusa kulturo (Ĉarot) . 336
La nacia reviviĝo en Blankrusio (Bjadula) . . . 407
Floras la bretona literaturo . . . 421
Nova organizmaniero . . . 325
La kreiĝo de super-ŝtato . . . 301
Komunumo je nomo de R. Luksemburg 20
Antisemitismo en USSR . . . 143
Peza industrio en Sovetio . . . 161
Terkulturo k regna komerco en Sov. 171
Moncirkulado en Sovetio . . . 203
Ekstera komerco en USSR en pas. jaro 242
10 jaroj de popola komisario por sankonservado en Sovetio . . . 219
Ŝparmovado en Sovetio . . . 267
Proleta ŝparado . . . 432
Tago de lab. gazetaro . . . 276
El vivo kaj agado de rusaj religiaj sektoj . . . 528

B. Memorartikoloj

Paĝo
Datreveno dekjara kaj dekunu-jara . . 41
Datrevena memorigo (milito) . . . 42
La Ruĝa Marto . . . 217
Roza Luksemburg k Karl Libkneĥt . . 122
(Mi estis, estas, estos; El Junius-broŝuro) . . . 123
Antaŭ 10 jaroj en Siberio . . . 180
Sovet-Hungario . . . 230
Antaŭ 10 jaroj en Hungario . . 385 433
Unua de majo . . . 273
La Komuno de 1871 k ĝia plej aĝa postvivanto . . . 209
Eĥo de l' Pariza Komuno en la cara Rusio . . . 291
Sakko-Vanceti . . . 471
Du pioniroj forpasis el la mondo . . 539

C. Sociologio, filozofio, historio

Al la direkto de morgaŭa ruĝo . . . 9
Tial mi ne povas kredi je dio . . . 17
Kiel festi Kristnaskon? . . . 101
La homa socio sub influo de konscia edukado . . . 177
La meĥanika epoko k la homa feliĉo 261
La ekzakta kono . . . 285
Leonard Nelson . . . 67
H. Bergson, filozofo de l' entreprenisto 93
El la filozofio de Klaŭdo Bernar (Bergson) . . . 94
Bazaj principoj de l' marksismo . . . 138
Inteligento, filozofio k marksismo . . 237
La filozofio de l' marksismo . . . 370
Klerigo de l' laboristaro . . . 381
Kulto al kadavroj . . . 36
Tradicioj, kultoj, ceremonioj en Japanio 129
La potenco de l' mistikismo (J. d' Ark) 297
Liberigo el mistikismo . . . 298
La morto de la Virgulino (J. d' Ark) 348 372
La trologateco de l' mondo . . . 405
Modernaj sociaj ideoj en la Antikveco 453
Pliintensigo de lab. kulturo . . . 36
Pri proleta literaturo . . . 33
Pri malpermeso de alkoholaĵoj en Usono . . . 189
Ĉu ili estis sennaciuloj? . . . 220
Du mortovortoj . . . 161
Internaciistaj pensoj . . . 325
Kio estas inteligenteco? . . . 126
Pensi — Kredi . . . 279
Dubi . . . 303
La kamentubo . . . 520
Dornoj . . . 51
La cerbo de Lenin . . . 139
Pri klasbatalo . . . 394 503
La anglaj elektoj k virinoj . . . 360
Ĉu ĉiam estis sklavo la virino? . . . 4
Pli science ol scienculoj . . . 361
Krimo de la Ironio . . . 431
Skizoj el libro "Super la Fordismo" . 302

El la Historio de l' Socialismo:

La Sen-Simonismo . . . 29
La cirkulada teorio de Leru . . . 44
L. Blan . . . 60
K. Marks . . . 73
Kolektivismo . . . 80
Individuismo . . . 97

Pago

Anarkismo 132
Ed. Vajan 144
Furierismo 222
Kolins 256
Buonaroti 314
La komunismo de Tabor 338
La ĉartismo 447
Pri la himno "La Internacio" . . . 507 518 530 539

Ĉ. Kooperativa movado

Iom pri la kooperativa movado en Svedio . . 2 11 19 27 43 51 58 69 89
Kooperativa movado en Portugalio . . 70
Per kooperado al socialismo 151
Kooperado en Hindio 312
Patro de ukraina kooperacio 337
Konsum-kooperativo Leipzig-Plagvic 396
Koop. movado en Mezgermanio (Halle) 419

D. Sindikata movado

Historio de la Pacifika Sindikata Movado 525
La evoluo de prof. k fakunuiĝoj ĉe la aŭstria ferv. 53
Trafika evoluo en Anglio 199
Kio estas MK. PDRM? (metalistoj) . . 473
Al SAT-anoj k prol. esp-istoj de Pacifikaj landoj 395
Kio estas IWW? 537

E. Edukado, instruado

Instruista Labor-Ligo 10
Sveda Lab. Kleriga Asocio 27
Vivo k laboro en S. K. M. (Sovetio) . 79
Komis. de Supera Lernejo ĉe VOKS . 384
Gepatraj Asocioj en Bavario 80
Gepatraj Konsilantoj en Anglio . . . 211
Iom pri vivo k laboro de vilaĝa instruisto (Sovetio) 327
Normigo de formatoj 246
sen granda literoj 314 447
Ni k stenografio 53
Stenografio k esp-o 89 99 340
Kiam fine unuecigo de la alfabetoj? . . 530

F. Priskriboj

La brita ministo k lia mondo . . 357 370
Vojaĝaj impresoj el Suda Ameriko . . 10
Hodiaŭ en Bulgario . 3 35 50 66 103 141
El Usona Taglibro 68 96 276 300 472
Beluĝoj 121
La mizerega distrikto Valdenburg (Silezio) 66 78
Kelkaj vortoj pri Dagestanaj arbaroj 81
Laboristo vizitas vilaĝon (Sov.) . . 327
Al monto Tri Seĝoj 131
Situacio de rusaj virinoj en Hungario 141
El post la arkta linio 85
Hejmo por vaguloj 88
Transportlaboristo en Ŝefild 96
Lab. cirkonst. de tabaklab. en Aŭstrio 103
Buĥara 106 124 133 142
Turkestan-Ĉumĥurijat 460 473
Tra (arkta) Sovetio 106
El Sibirio 200
El foraj anguloj de Siberio 382
Blua trankvileco 142
Giganta vilaĝego-urbo 190
La vivo sur la maro 198
Vizito al sovetia ŝipo Dekabrist . . . 240
Pri ruslanda ŝiparo 267
En kolektiva mastrumejo 333

Pago

Nia infankolonio (Loŝkarivka) . . . 201
El vivo de sovetia infandomo 132
Kien iras senlabora K-do? (Jap.) . . 326
Tra Sovetio (El vojaĝa taglibro) . . . 516
La vivstato de malriĉaj virinoj en Japanio 210
Vivstato de laboristoj en Japanio . . 218
Fajrego en pensiono (Japanio) . . . 242
Kiel ni estas persekutataj (Japanio) . 334
Letero el orienta Persio 287
Vizito ĉe Tom Muni 114
Antaŭen al nova vivmaniero 178
Nuntempa tajlormetio en Anglio . . . 140
Naturamika renkontiĝo en Berĥtesgaden 211
Banekskurso k propagando 409
Sur patriotaj batalejoj (Naturamika festo) 459
"Porrikolta milito" en sov. vilaĝo . . 458
Paĝo el infana vivo (Sovetio) 373
Marista vivo 301
Fiŝkaptista movado en Kanado . . . 324
La ŝafpaŝtisto en Dakota 517
Faktoj pri britaj laboristinoj 324
Kio estas Aeroarktik? 325
Vojaĝo al Londono 457
La Belvilŭaz, Sidejo de SAT 275
Pri Nederlando . 288 326 348 358 390
Mezgermania Industriregiono . . 299 310
Pri Saksa Svisio 255
Leipzig, la urbo de nia 9-a 321
Ĉefstacidomo en Leipzig 265
Stato de fervojoj k fervojistoj en Leipzig 278 291
Turingio 383
Iomete pri hejmindustrio en la Metalmontaro 241
Skoghall en Svedio k ĝia esp. movado 504
En germana kuracloko 505
"Popola domo" en Danio 334
Faktoj pri la sola zinkfabriko en Nederl. 335
Franca Sudano 359 371 384
Laborkond. k stato de kamparanoj en Malgrandpolio 418
Spite ĉio! (Popoldomo Leipzig) . 158 170
Lab. Vetur-Asocio (Britio) 20
La fiasko de kolonio 359
Travivaĵo 528
Grandaj Infanoj 529
Triumfo de la tekniko 530

Moroj, kutimoj:

Por nova moraro (Sovetio) 506
Piedpilkludo en Britio 460
Arbaraj laboristoj en Usono 334
Vilaĝana geedziĝo en Sovetio 336
Sovaĝeco (Ukrainio) 203
Virino en Turkmenio 72
Virina sklaveco 81
Sovetiaj kamparaj superstiĉoj 105
Soveta Alasko 239
La Ŝamana mistero 251
El Brita trinkejo 278

Biografioj:

E. Izgur 54
Ciŝka Hartni 87
Ludovikino Miŝel 151
Neĝam Mohamed 215
Tomas Meabe 263

Tagoj el mia Vivo:

Ordinaraj . . 4 21 28 60 81 88 97 107 124 162 182 201 213 221 279 289 337 408 432 475
Eksterordinaraj 37 143 445
Vivo de teatra artisto 44
Kvindekjara vivo en sovaĝejo . . 350 361
Mia buĝeto 73

G. Faktoj kaj komentoj

Pago

La internacieco de l' kapitalismo . . . 79
Internaciaj reefikoj 87
Tutmonda trusto de elektro 105
Nacia idolo 115
Kulto al fetiĉo 71
Eminentaj kontraŭmilitaristoj 54
La estonta milito 87
Por la venonta mondmilito 144
La daŭremo de malnova raso 200
Timo pro la vero 71
Papo pri virina gimnastado 71
El Kubo 54
Indiĝenoj en Usono balotas 71
Mallongigo de l' labortago en Usono . 79
"Regno k landoj" en Germanio . . . 79
Junularo k eklezio en Britio 200
Oni vendas siajn privilegiojn 346
Kiom da lingvoj estas en Eŭropo? . . 190
Viktimoj de la laboro 504

Faktoj sen komentoj:

La usonaj kapitalistoj atakas la mondon 171
Usono akiras la mondmerkaton . . . 241
La venengasoj 241
Lab. movado en Hindio 277
Nacia Civitana Federacio en Usono . . 59
Oni ŝirmas la moralon en Usono . . 362
Oni elspezas por militiloj 475
Klasjusteco 362
Hipokrita rolo de la Ruĝa Kruco . . 499
Memmortigoj k akcidentoj (Budapest) 59
Vero 59
La organizoj de l' katolikaj virinoj . . 203
La situacio de l' intelektuloj en Japanio 324
Ŝtato konsentas perdi sian "liberecon" 277
Socialismo — Kapitalismo 325
Laŭ pastra konsilo 324
Ekonomiaj notoj 421 474

Ĝ. Diversaĵoj

La "Ford" de l' ŝufabrikado 5
Kulturreakcio en Germanio 239
Tatuo de lernejinfanoj en Italio . . . 5
Unuecigo de l' alfabetoj 12
I. W. W.-informo 12
Kroniketo el Hispanio 12
Malvera informado pri Aŭstralio . . . 37
Pri pentekosto 37
Sovetiaj kamparaj "notoj" 53
Virino en kompartio 124
Kresko de ŝtata buĝeto (Sovetio) . . 141
Interesa eltrovo 141
Homoj kun vostoj 141
Kvarmiljaraj skribaĵoj sur rokoj . . . 192
Eklezio k sendiuloj en Germanio . . . 192
La testika greftado 242
La germ. loĝantaro koncentriĝas en urboj 242
La Internacio de l' kapitalistoj 242
5-taga semajno en Usono 279
Oni plenumas manifeston de "10 jaroj Oktobro" 312
Britaj ministoj k iliaj forlasitaj legomĝardenetoj 396
Ne en Göteborg 72
Vivkostoj en Portug. 72
Lernejoj en Sovetio 81
Nomŝanĝoj en Ĉinio 81
Britio antaŭ la balotoj 81
Foto-amatora asocio 96
Germ. lab. mandolinistoj 107
Amnestio en Bulgario 131
Redakt. de "Balk. Laboristo" arestita 397
Kiom kostas stultigado? 160
Iom el energetiko 160
Solidareco (Haliien) 198
43 tagojn sen manĝo 211

Paĝo
Pri malsatstrikoj 255
La senlaboruloj en Kanado 250
Iom pri eklezio en Sovetio 265
Notoj el Sovetio 473
Alkoholuloj k idaro 265
Kiel ni laboras 301
Lumo donas forton 302
Pri "popolaj domoj" k simil. 459
Fumado inter virinoj k junulinoj . . . 460
Miraklo (Rak.) 349
La "stultaj" rusoj (Rak.) 349
Por nia distro . 302 328 338 371 518

H. Diskutejo

Pri SAT-programo k "La Lab. Esperantismo" . . 115 126 164 172 184 192 203 213 224 232 244 254 266 280 291 309 322 397
Pri seksa demando . 135 166 283 221 314 374 422 440
Kia devas esti mia edzino? 303 374 387 422 461
Kial nudkulturo? 507
Pri nacia problemo 328 409 462 476 531
Pri iuj "Tagoj" 303
Pri teatro-film-paĝo 206
Troa gastigemo 84
Ĉu ĉiam estis sklavo la virino? . . . 54
Pri esp. teatro . . . 437 479 522 535
Protesto kontraŭ Krjukov 328
Pri la problemo de trologateco de la mondo 531

Ĥ. Literaturo

Versoj:

Kolono de Vandom' 73
Parizo (L. Miŝel) 152
La 58-a datreveno 326
Printempe ĉe frataj tomboj 218
Maja Simfonio 274
La poeto proleta 373
Sonoras sonoriloj 471
Espero 471
Balaado ĉirkaŭ la propra domo . 133 146
Skribu al infanoj el Sovetio 431

Prozo:

En Printempo 274
Fragmentoj el "En la okcidento nenio nova" 443
El revolucio de 1905 en Rusio . . . 504

I. Varbartikoloj

Sur vojo al kvara milo 65
El niaj leteroj 127
Novan paŝon antaŭen! 137
Imitinda oferemo k agemo 205
Varbu! 225
Kelkaj pripensoj okaze de nia IX-a . . 441
Postkongresaj pripensoj 469

J. Specialaj Paĝoj

Paĝo
Sporta Paĝo . . 13 108 153 202 304 375 463 464
Scienc-Kultura Paĝo 38 82 125 183 223 253 329 386 435 519
Liberpensula Paĝo . 117 163 212 243 315 363 423 477 544
Junulara . 145 191 231 339 446 532 533
Virina 173 290 351 398 508
Edukista 410

Ĵ. Tra Esperantio

Oficialaj komunikoj (de Direkcio kaj Plenum-Komitato) 62 83 109 134 205 246 340 365 448
Inter Ni . 6 14 30 39 234 247 269 316 352 365 534
Ekster Ni 22
El la Redaktejo 14 30 109 154 246 330 354 462 478
El la Administrejo 6 45 46 55 99 119 166 293 402
Esp. Servo de SAT, laborista korespondado k. s. 14 45 46 109 134 135 154 174 185 225 245 258 281 283 306 318 330 331 353 354 400 478 510 522 545 546
Pri korespondado 7 15 47 118 127 135 147 166 195 225 293 376 466 479 510
Pri esp. instruado . . 234 258 399 465 520 534 545
Pri la SAT-Vortaro . . 7 61 268 546
Kulturtaskoj de SAT en ideologio . . 233
Malkareso 6
Laborplano de SAT-rondo (Ĉita) . . 46
Vero antaŭ ĉio 47
La arto de l' tradukado 98
Maristaj esp-istoj 55 98 226
La Konvencio inter SAT k LEA 204 450
Jarkunvenoj de LEA: brita 270, franca 294, nederlanda 317, aŭstria 342, hungara 353
Esp. k ITF 248
Sukcesoj de esp-o 22 39 45 110 194 282 377 378 390 391 450 500 510 522 547
Tra la movado (Kroniko) . 7 15 22 31 40 55 62 84 90 91 99 110 119 127 135 146 155 167 175 186 195 207 215 226 234 247 258 270 283 294 307 317 331 343 354 366 378 391 403 428 450 466 479 511 523 536
Ĉe la neŭtraluloj 7 62 91 99 110 119 135 147 167 175 186 195 215 226 235 258 270 283 317 331 367 379 403 428 450 523 536
Ĉe la katolikoj . 31 147 167 186 536
Ĉe la religiuloj 259

Paĝo
Ĉe la faŝistoj 31
Tra la esp. gazetaro 318
Ni ignoras la kleran okcidenton . . . 364
Persekutoj en Litovio 282
Polemiko kun neŭtraluloj . 30 91 109 155 165 205 257 478
Vivo, movado 22 55
Esp. fonto Hungario 15
Pri Tolstoj 22
SAT-pagiloj 110 146 155
Pri sennaciismo 135
Pri la gazeto 193 388 534
Paĝo de Sennacieca Literaturo . . . 439
Jarlibro 55 193 306 316 427 439 449
Deklaro pri Soares 511
Komuniko pri R. Naville 318
Peranto de SAT k ties laboroj . . . 424
Pri satira versaĵo 194 317
Propagando 90 110 127 134 174 206 268 282 284 292 316 343 389 390 402 412 466 535
Prilingvaj artikoloj k notoj 15 16 31 62 84 110 119 127 135 166 175 259 318 342
Radio-rubriko k notoj 40 90 179 292 354 366 402 427 449 185 200 522 445
8-a Kongreso de SAT 31 39
9-a Kongreso de SAT 61 118 165 214 233 245 257 268 269 281 293 305 340 342 352 364 377 388 401 402 411/13 421 425/27 433 436 438/39 448/49 456 469 481/98 (Protokolaro) 509 521 535 546
Antaŭkongresoj 256 269 293 306 316 341 377 402 414 438
Alvokoj al liberpensuloj 14, 39; virinoj 30, 89; junularo 83, 185; naturamikoj 155; instruistoj 331; foto-amatoroj 500; socialistoj 367, 428; komunistoj 62; metalistoj 546
Mandolinista festo 414
Recenzejo 7 15 23 40 56 63 91 99 111 135 147 167 207 216 235 247 259 307 331 367 391 403 414 451 466 480 500 511 523 536
Memornoto 16 31 40 47 56 63 84 92 100 112 120 128 135 148 156 167 176 187 208 216 226 235 248 259 271 284 295 308 319 343 368 379 392 403 439 451 468 479 500 536 547
Nia poŝto . 8 16 24 32 40 47 56 63 84 92 100 112 120 128 135 148 156 167 176 186 196 208 216 227 248 260 271 284 296 308 319 332 344 355 368 380 392 404 415 428 440 452 468 480 500 512 524 536 547
Korespondado 8 24 32 47 63 92 112 128 148 176 187 196 208 227 236 260 271 295 319 332 355 368 415 440 452 468 480 524 547
Korektoj . . . 40 147 319 517 547

Abontarifo al Sennaciulo: (La unua nombro montras jarabonon por membroj de SAT, la dua en krampoj montras la jarabonon por nemembroj. Ni ankaŭ akceptas ¼-jaran abonon.)

Argentino, pes. 5 (6); Aŭstrio, ŝil. 10 (12); Belgio, belgo 10 (12); Brazilio, milrejs. 15 (18); Britio, ŝil. 8 (9); Bulgario, lev. 200 (250); Ĉeĥoslovakio, kr. 50 (60); Danio, kr. 8 (10); Estonio, kr. 7 (8); Finnlando, mk. 70 (80); Francio, fr. 35 (40); Germanio, mk. 8 (9); Hispanio, pes. 10 (12); Hungario, peng. 8 (10); Italio, lir. 40 (45); Japanio, jen. 4 (5); Jugoslavio, din. 100 (120); Latvio, lat. 8 (10); Litovio, lid. 15 (20); Nederlando, guld. 5 (6); Norvegio, kr. 8 (9); Polio, zlot. 12 (15); Portugalio, esk. 35 (40); Rumanio, lej. 300 (350); Sovetio, rubl. 4 (4,50); Svedio, kr. 8 (9); Svisio, fr. 10 (12); Usono, dol. 2 (2,50). — Ponumera prezo estas: 0,20 mk. g. = 0,25 fr. svis.

MONON ONI SENDU: rekte al la Administranto de SAT, **Richard Lerchner, Colmstr. 1, Leipzig-O-27 (Germanio)**, poŝtĉekkonto 6835 aŭ pere de unu el la jenaj poŝtkontoj, ĉiuj je la nomo de R. Lerchner: Bruxelles, 227 848 — s'-Gravenhage, 142 084 — Praha, 501 007 — Stockholm, 4268 — Warszawa, 191 335 — Wien-D, 137 725 — Zagreb, 40 040 — Kobenhavn, 14 938 — Zürich-VIII, 15 929 — La francianoj pagu al Sennacieca Asocio Tutmonda, 23 rue Boyer, Paris-XX, per la poŝtkonto 1234—22. — La sovetianoj al CK de SEU, poŝtkesto n-o 630, Moskvo. En landoj kie ni ne havas poŝtkontojn, oni pagu per **ŝtataj monbiletoj en registrita letero.**

SENNACIULA LIBERPENSULA PAĜO

N-o 9 REDAKTAS LIBERPENSULA SEKCIO DE SAT N-o 9

Manuskriptojn sendu al: KURT HUBRICHT, Leipzig O 30, Mariannenstrasse 22. Sekretario de la Sekcio: KURT KLAPS, Danzig, Karpfenseigen 12

Raporto pri la fakkunveno dum la IX. SAT-Kongreso en Leipzig

La fakkunveno de la liberpensuloj okazis la 7-an de aŭgusto en la Popoldomo, vespere je la 20-a h. Ĉeestis 75 Gek-doj el jenaj landoj: Aŭstrio, Belgio, Dancigo, Ĉeĥoslovakio, Nederlando, Germanio. Estis reprezentataj: Internacio de Proletaj Liberpensuloj per K-do prof. Hartvig, Vieno, Asocio de Socialistaj Liberpensuloj per K-do Wiesner, Leipzig, kaj aliaj estrarmembroj, Asocio de Proletaj Liberpensuloj por Rejnlando kaj Vestfalio per K-do Burger, Essen, Asocio por Liberpenseco kaj Kremacio per K-do Rode, Leipzig, Ligo Materialista de Belgio per K-doj Desmet kaj Destrée, Bruselo. Eniris salutletero de Ateista Sekcio de Sovetrespublikara Esp-ista Unio. La Unio de Militantaj Ateistoj USSR estis sendinta 50 broŝurojn de la esperanta eldono "Lenin, Pri religio" kiel donacon por la partoprenantoj de la fakkunveno. La Opozicio de la "Asocio por Liberpenseco kaj Kremacio, Loka grupo Leipzig" estis disdoninta la aŭgustan numeron de sia "Weckruf" (Vekvoko) kiu enhavas salutskribon esperante kaj germane. Gvidis la kunvenon K-do Klaps, Dancigo. K-do Hubricht, Leipzig, donis raporton pri la agado kaj sukcesoj de la sekcio: "Sennaciula Liberpensula Paĝo" aperis ĝis nun sepfoje kaj Liberpensula Gazetservo okfoje. Li plendis pri la neaktiveco de la liberpensuloj-esp-istoj. Tamen la sukcesoj estis relative kontentigaj. La gazetoj "The Freethinker, Le Matérialiste, Der proletarische Freidenker, Atheist, Bezboĵnik, Der Sozialistische Freidenker" k. a. regule ĉerpis el nia gazetservo. En la lasta n-o de "Der proletarische Freidenker" estas presita la tuta Bulteno n-o 6 en esperanto. Per la proletaj esp-istoj estas fondita liberpensula organizo en Svedio kiu jam aliĝis al Internacio de Proletaj Liberpensuloj. Ligo Materialista de Belgio aranĝis Esp-istan Fakon. Sekvis la parolado de K-do prof. Hartvig pri "Esperanto kaj la liberpensula movado". La teksto estos publikigata en la oktobra n-o de "Liberpensula Paĝo en Sennaciulo". Tiam oni diskutis pri la proponita Labor-programo, kiun estis ellaborintaj K-doj Adamson-Göteborg, Incertov-Moskvo, Muravkin-Berlin, Hubricht-Leipzig. Post malgrandaj aliigoj oni akceptis la laborprogramon. Ĝi aperos en la novembra numero de nia Paĝo. Raportis K-do Klaps pri la stato de la kaso. Eniris kotizoj je sume 123.10 mk. g.; la elspezoj sumiĝas je 84.— mk. g. Restas havaĵo de 39.10 mk. g. En la laborkomitaton oni elektis kiel Landreprezentantojn: Adamson-Göteborg, Incertov-Moskvo, Burger-Essen, Chapelier-Bruselo, Coll-Grenoble, Korinna-Halifax, Fröding-Rockford, Klaps-Dancigo, Halpern-Lublin, Perhak-Budejovice, Roosing-Zeist, Neuwirth-Bregenz; kiel Sekretarion-kasiston: K-don Klaps-Dancigo; kiel Redaktanton: Kurt Hubricht, Leipzig. Prof. Hartvig proponis elekti iun kiel daŭran peranton inter la Sekcio kaj la IPF. Estis destinata kiel peranto inter IPF kaj la Sekcio K-do Kurt Hubricht-Leipzig.

LIBERPENSULOJ-ESPERANTISTOJ!

El la supra raporto vi vidu, ke ni kreis dum la fakkunsido firman bazon por plua vigla agado; estas nun via devo subteni la Sekcion per via tuja aliĝo kaj kunlaboro. Observu la liberpensulan movadon en via regiono kaj ankaŭ religiajn okazaĵojn, verku koncizajn artikolojn pri ili sendante, ilin al nia redaktanto. Ni esperas, ke la partoprenintoj al la lasta fakkunveno iĝos daŭraj kunlaborantoj.

SUKCESO EN BELGIO

Laŭ propono de sia Ekzekutiva Komitato, la Centra Komitato de la Ligo Materialista de Belgio voĉdonis la sekvantan rezolucion:

Estas aranĝita fako esperantista, kiu disvastigos ĉiulanden la materialistajn principojn per esperanto, kaj rilatos kun SAT-Liberpensula Fako.

Artikoloj kaj gravaj leteroj estu submetotaj, laŭokaze, al la Ekzekutiva Komitato aŭ al la Redakcia Komitato, kiuj estas respondecaj antaŭ la anaro de la L. M. B. C. K. enskribas, ke nuntempe ses el siaj membroj estas samtempe SAT-anoj.

Aprobas, ke K-do Emile Chapelier estu sekretario de tiu fako.

Prezentas al la proleta esperantistaro siajn revoluciemajn salutojn.

LA EKZEKUTIVA KOMITATO
C. Serwy. J. Gueux. Emile Chapelier.

NI FONDU ĈIUJARAN INTERNACIAN TAGON DE ATEISTOJ

La legantoj kaj korespondantoj de sovetia ateista gazeto "Bezboĵnik" proponas starigi ĉiujaran tutmondan ateisto-tagon, dum kiu liberpensuloj-ateistoj de ĉiuj landoj, de ĉiuj nacioj unuigite elmontros siajn fortojn kaj unuigit-fronte atakos religiojn, priservantajn la klasmalamikon de l' Proletaro. Ni opinias, ke ĉi tiu propono estas akceptinda. Ĉiuj liberpensulaj organizoj kaj gazetoj devas en siaj kunvenoj kaj paĝoj pridiskuti la demandon. La virinoj havas Internacian tagon, la junularo ankaŭ, Internacia Ruĝa Helpo ankaŭ: Fondu Internacian Tagon Ateistan ankaŭ ni ĉiulandaj liberpensuloj, kontraŭreligiuloj proletaj!

LETERO EL ANGLIO

Mirinda provo de la senmorta povo de la Eklezio en Anglio okazis komence de julio en vilaĝo apud la fama universita urbo Kembriĝ (Cambridge). Iu arinomisto (?)[1], kiu estas ankaŭ urba konsilanto, aĉetis dum 1916 pecon da tero kaj en la vendkonsent-dokumento estis menciita, ke la aĉetanto estus devigota riparigi, laŭ la menciitaj antikvaj ekleziaj leĝoj, la preĝejon de la vilaĝo. S-ro Stevens, la aĉetanto kaj akuzito, neas, ke li sciis pri tiuj leĝoj kaj devo riparigi la preĝejon.

Sekve, kiam la preĝeja zorgantaro decidis riparigi la preĝejon, ĝi alvokis s-ron Stevens kaj atentigis lin pri la necesaj difektoj. Li estis surprizita kaj rifuzis farigi la riparojn. La preĝantaro lin akuzis antaŭ la Eklezia Juĝantaro en Kembriĝ kaj tie li estas juĝita malprava en sia rifuzo ne fari la riparojn. Li persiste rifuzis kaj sekve la Eklezia Juĝantaro arestigis lin per la polico. S-ro Stevens rifuzis akcepti la aŭtoritaton de la Eklezia Juĝantaro, sed la pruvo pri la respondeco estis skribita en antikva dokumento el la jaro 1871.

Post kelkaj tagoj de enkarcerigo, la leĝisto prizorgante la aferojn de s-ro Stevens, konsilis lin promesi fari la riparojn. Li promesis tion kaj nuntempe li estas ree libera. S-ro Stevens estas kristano.

* * *

Angla ĵurnalo nun provas transformi la faman ĉinan gvidinton d-ron Sun-Jat-Sen en kristanon. La ĵurnalo diras: "Nuntempe li estas objekto de memorservoj en kelkaj kristanaj preĝejoj en Ĉinio. Oni laŭdas lin kiel sciencistou kaj ĉefdirektinton de gehomoj kaj ankaŭ kiel kristanon, kies plej ŝatata religia kanto estis 'Jesuo, Amanto de mia animo', kaj la Tutĉinio lin laŭdas kiel homon, pere de kiu ĉinoj trovas sian veran animon."

Kiel ofte farite, la ekleziuloj provas farigi faman homon — post lia morto — religiulo.

* * *

En Anglio la sola anonco por eltiri la infanojn de l' religia instruado, estas simpla peto al la lerneja mastro. Sed la Nacia Liberpensula Asocio ĵus eldonas presitan dokumenton, kiu faciligos la aferon.

* * *

La respondoj al la tri elektaj demandoj pri religio estas sufiĉe interesaj. Klare kaj honeste kelkaj respondis aŭ jes aŭ ne. Sufiĉe granda nombro rifuzis respondi. Aliaj kandidatoj por parlamento diris, ke ili subtenus religian instruadon, se la publiko tion postulus. Tio estas la karakteriza vidpunkto de anglaj politikuloj. Sekvu, ne gvidu!

L. Korinna.

[1] Ĉu "agronomiisto"? — Red.

TRA ESPERANTIO

NI ESTU LOJALAJ!

Ni donas ankoraŭfoje spacon al kompetentulo pri la instru-metoda temo, por ke niaj legantoj povu formi al si opinion pri la afero.
Red.

Tre malagrable frapis min la artikolo "Laŭ kia metodo oni devas instrui esp-on?" de K-do Soares en "S-ulo" n-oj 253/54, nome la maniero, en kiu la cetere simpatia K-do diskritikas aferon, kiun li tute ne konas, k insultas personon, kiu meritas ĉion alian krom insulto. En sia artikolo K-do Soares diras, ke li esploris la Ĉe-metodon, sed en kio konsistas liaj esploroj, mi ne scias: li neniam partoprenis eĉ unu lecionon de la Ĉe-metodo, kiel li mem diris. Do li ne povas ankaŭ priskribi k kritiki tiun metodon. Tio, kion li skribas en "S-ulo" pri la Ĉe-metodo, estas tute malvera k elpensita. La malamo de K-do Soares al la rektaj metodoj ĝenerale k al la Ĉe-metodo speciale devenas verŝajne de tio, ke antaŭ kelka tempo li mem provis fari tiajn kursojn tie ĉi en Svedio, sed bedaŭrinde tute malsukcesis, kiel li mem konfesas. Tia animstato memorigas la fablon de Krilov[1] pri vulpo k vinberoj: kiam la vulpo ne sukcesis atingi la sukplenajn k bongustajn vinberojn, li komencis insulti k diskritiki ilin... K-do Soares evidente tute ne scias, ke inter rekta metodo k rekta metodo estas granda diferenco, kion montras jam tio, ke lia rekta metodo k li mem kiel instruisto malsukcesis, dum la metodo de Ĉe rikoltas laŭrojn en Svedio, Hungario, Estonio, Rumanio!

La subskribinto ĉeestis kelkajn Ĉe-kursojn k mem faris kursojn laŭ tiu metodo en Estonio k Svedio, k li povas do certigi la K-dojn, ke la Ĉe-metodo estas nenia blufo, sed granda k talenta verko en la esp. instruado laŭ rekta metodo k en la lingvo-pedagogia fako ĝenerale. Per tiu metodo la kursanoj lernas eksterordinare facile k rapide: pro la ekstreme interesa k atento-streĉa instrumaniero ili vere kunvivas la lecionojn k jam de la komenco kutimiĝas al la uzado de esp-o tute sendepende de la nacia lingvo, tute ne atentante la idiotismojn k "diablaĵojn" (kiel diras Soares) de sia gepatra lingvo. La Ĉe-metodo estas rigore sistema, plene eluzanta la simetrian, logikan konstruon de l' esp. gramatiko, transiranta ĉiam de konata al nekonata, de nova al malnova, de facila al malfacila; neniam okazas en Ĉe-metoda kurso, ke la lernantoj ne komprenas la instruiston (kompreneble, li devas esti tre kapabla k lerta!), kiel okazis al Soares: por klarigado de novaj lingveroj la instruisto uzas nur malnovajn, jam lernitajn. Neniam en Ĉe-kurso la lernantoj rutine ripetas la samajn vortojn k frazojn, kiel asertas K-do Soares. La rumana s-ano Morariu ne estas interpretisto de Ĉe, sed faras laŭ la sama metodo tute memstarajn grandsukcesajn kursojn en diversaj lokoj de Svedio.

La Ĉe-metodo ricevis tre altan takson k plenan rekonon de multaj pedagogiaj aŭtoritatoj en diversaj landoj. En sept. Ĉe faros laŭ la invito de la urba lerneja inspektoro k K-dino Dresen en Tallinn kursojn por la estonaj instruistoj k aliaj, ĉar per siaj kursoj antaŭ unu jaro en Tallinn k Tartu li tute gajnis al sia metodo la estonajn pedagogojn. Ĉu jam tio sole ne pruvas sufiĉe la altan valoron de la Ĉe-metodo? Anstataŭ insulti k moki oni ĉeestu unu Ĉe-kurson k persone konatiĝu kun la metodo.

Instruado estas arto k instruisto devas esti artisto en sia fako, precipe tiu, kiu instruas en fremda lando laŭ rekta metodo. Pro tio ne ĉiu senlaborulo taŭgas kiel esp. instruisto. Antaŭ ol iri en eksterlandon por gvidi esp. kursojn laŭ rekta metodo, ĉiu aspiranto devas akiri al si lertecon k pruvi sian kapablecon per rektmetodaj kursoj en sia hejmlando. Alimaniere povos ripetiĝi la malagrabla k por la disvastiĝo de esp-o malutila historio de Soares.

Henr. Seppik.

[1] Ŝajnas, ke la fablo estas de Ezopo. — Red.

LA JUNKOMUNISTARO DE UKRAINIO LERNOS KAJ APLIKOS ESPERANTON

Dank' al la sukcesplena esp.-servado de junkomunistoj en Lugansk, Kremenĉug, Dnepropetrovsk, Kiev k aliloke, dank' al la popularigo de tiu rolo de nia interkomprenilo en komjunulaj rondoj, sukcese farita de K-doj E. Izgur (Kremenĉug), Gluŝĉenko (Ĥarkov), tra Ukrainio ekruliĝis ondo de simpatioj por esp-o. Rapide sinsekvis la sukcesoj. En junio la Luganska komjunulara distrikta komitato eldonis broŝuron pri la internaci-korespondada laboro de l' tieaj jun-esp-istoj. La broŝuro finiĝas per alvoko sekvi la bonan ekzemplon de Lugansk. Responde aperis ukrainlingva broŝuro, eldonita de Ŝtateldonejo, dediĉita al la 10-jara jubileo de l' Ukrainia Komjunulara Unio. La konkluda ĉapitro estas modelo de poresp-a propagando. 30. julio la organo de l' Unio publikigis duonpaĝan artikolon de K-do Gluŝĉenko: "Ni disligu la katenojn de l' multlingveco". 17. aŭg. la sama ĵurnalo publikigis specialan poresp-an paĝon kun pluraj artik. pri la esp. servado k kun rezolucio de l' Centra Komitato, entenanta longan parton prilingvan k diranta i. a.: "Konsiderante... ke la intern. lingvo esp-o sufiĉe pruvis sian plenan taŭgecon por ajnaj celoj: sciencaj, literaturaj, intern. lab. korespondado, buŝa k skriba, k la interkompreno de diverslingvaj proletoj el div. landoj; ke esp-o laŭ la facileco de l' ellerno estas pli facile ekposedebla por la prol. junularo ol iu ajn alia lingvo; ke la praktika uzado de esp-o en la lab. junularo ĉiulanda por la celoj de intern. koresp-ado povas multe helpi la aferon de interkompreno k unuigo de l' lab. junularo diverslanda —, la Oficejo de CK LKSMU konsideras necesa rekomendi al la lab. junularo de Ukrainio k antaŭ ĉio al la membroj de l' Lenina Kom. Junulara Unio de Ukr. ellerni la intern. lingvon esp-o k vaste eluzi ĉi tiun lingvon kiel utilan praktikan ilon de intern. koresp-ado. precipe en ĉiuj okazoj, kiam ĉi tiu interkompreno k koresp-ado pere de alilandaj lingvoj estas malfacila. Rekomendi la organizadon de rondetoj k kursoj de esp. studado por la lab. junularo k junpioniroj, penante fari esp-on la akiraĵo de l' lernejа k lab. junularo per la lernejoj. Konsideri celkonforma kunvoki tut-ukrainian konferencon pri intern. koresp-ado. Aldoni al la intern. komisiono de CK LKSMU tri junkom. lab. esp-istojn. Meti la devon por la membroj de intern. kom. de CK ellerni esp-on ne pli malfrue ol ĝis 1. 1. 1930."

La rezolucio estis represata plurloke kun alvoko al realigo de l' direktivoj. Ni estas ĉe la sojlo de amasa esp-istiĝo de junkomunistoj k junpioniroj. Alruliĝas ondo de stud- k korespond-deziroj. Ke niaj ekstersovetiaj junkom. K-doj respondu amase la korespond-petojn! La triumfon de esp-o en Sovetio ĉiam decidos la reago k revoko de l' sovetisimpatiantoj eksterlandaj. Ni atendas samfavoran rilaton al nia afero fare de l' Ukr. Kompartio. La sukcesoj en Ukrainio eĥu tra la frataj organizoj.

Dneprano.

LA PLEJ POTENCA RADIO-DISAŬDIGEJO DE EŬROPO

En sept. ekfunkcios en Moskvo la radio-disaŭdigejo de Tutsovetia Konsilantaro de Profesiaj Sindikatoj (VCSPS). Oni asertas, ke ĝi estos la plej potenca radio-sendilo de Eŭropo (70 k.-ŭ.). Grandan parton de l' programo de tiu stacio okupas la por-alilandaj disaŭdigoj: trifoje semajne la programo estos speciale kunmetita tiucele k enhavos raportojn, informojn, lekciojn ktp. en germana k aliaj okcident-eŭropaj lingvoj. La ondlongo estos sciigata poste (aŭddistanco je 2500 km.). Tre gravas, ke la K-doj ĉiulandaj eluzu la bonan okazon por aŭskulti novajn bonajn disaŭdigojn el Sovetio k urĝe peti la administrantojn ne forgesi en la programo esp.-lingvan parton. Skribu (prefere esp-e) al Radio Stancia VCSPS, Kult. Otdel VCSPS, Dvorec Truda, Soljanka 12, Moskvo.

Dneprano.

N. LENIN:
Ŝtato kaj Revolucio
150 paĝoj, formato 12×18 cm. Prezo 1 mk. g.
Mendu tuj ĉe la Administracio de SAT

La Vegetarana Fakkunsido dum la 9-a SAT-Kongreso

Ĉi tiu kunsido okazis la 6. aŭgusto vespere je 21-a h. en la Popoldomo. K-do Löwe-Leipzig malfermis ĝin. Raportado k diskutado estis tre viglaj. Oni deziris, ke la funkciado estu pli aktiva. Tiucele alvenis multaj proponoj. Antaŭ ĉio estis ĉiuflanke dezirata, ke en "S-ulo" aperu Vegetarana Paĝo. Kiel novan gvidanton oni elektis K-don Walter, Germanio. La praktikajn rezultojn de la kunsido oni povas resumi en jenaj direktivoj, kiuj esprimas la decidojn de la kunvenintoj.

1. Ĉiu vegetarano organizita ĉe SAT tuj sendu sian adreson. (Nur por statistiko!) 2. Sendu adresojn de veget. manĝejoj por tiele starigi adresaron, kiu servu al niaj anoj dumvojaĝe. Ĉiu, kiu intencas vojaĝi, antaŭe povas informi sin ĉe la sekci-gvidanto. 3. Sendu artikolojn por "S-ulo" pri vegetarismo en via lando, kial k kiel vi fariĝis vegetarano ktp. 4. Sendu novajn proponojn k instigojn por nia Sekcio. 5. Informu la Sekcigvidanton pri aperinta veget. literaturo. Citu, se eble, la prezojn, eldonejojn k la verkistojn.

Ĉion sendu al la Sekci-gvidanto K-do Oskar Walter, Kleinschönau 21, ap. Zittau (Sa.), Germanio.

Nian fakkunsidon partoprenis 25 Gek-doj el jenaj 6 landoj: Aŭstrio, Ĉeĥoslovakio, Dancigo, Estonio, Francio, Germanio.



La vegetaranoj partoprenintaj la SAT-Kongreson en Leipzig

Do, karaj samcelanoj! Nun ni eklaboru! Ni nur rajtas paroli pri sukcesplena fakkunsido, kiam ni poste laboros laŭ niaj decidoj. Ne forgesu, kiam vi deziras respondon, enmeti respondilon.

(10 522)

RAPORTO PRI LA FAKKUNSIDO DE ANOJ DE RUĜA HELPO

Okazinta la 6-an de aŭgusto. Partoprenis ĝin 33 K-doj el Germanio, Anglio Belgio, Francio, Svedio kaj Ĉeĥoslovakio. La fakkunsido pridiskutis la problemojn de Ruĝa Helpo. Estas elektita K-do Köhnke por la gvidado de l' estontaj laboroj. Estas decidita, ke la artikoloj aperontaj en "S-ulo", kiuj temas pri R. H., estu signataj per supra titolo "Ruĝa Helpo", estas komprenataj ankaŭ la artikoloj, kiuj temas pri karcera vivo ktp. Ĉiuj, kiuj interesiĝas pri R. H., sin turnu al K-do Fr. Köhnke, Sartorius-Str. 22, III, Hamburg. Specialajn artikolojn sendu al li. Ĉiuj helpu en tiu grava laboro. 6709, 8464.

ALVOKO!

En la metalista fakkunsido dum nia 9-a SAT-kongreso estas starigita la Sekcio de la metalistaj SAT-anoj. La Sekcio celas la gravigon de esperanto en la sindikataj fakgazetoj per regulaj raportoj pri la vivkondiĉoj, laborbataloj kaj salajro-tarifoj en ĉiuj landoj. Mi petas la Gek-dojn doni siajn adresojn al la sekcicentrejo, krome sendi kolektive verkitajn leterojn, artikolojn ktp., kiuj koncernas nomitan temon, por eluzo en sindikata fakgazetaro, se eblas, el ĉiuj landoj. Gek-doj, ĉies kunhelpo estas nepra devo. Antaŭen al novaj venkoj! Frate salutante

Walter Ernst, Forst, N./L. (Germ.), Karlstr. 24. Sekcigvidanto.

ĈIRKAŬ LA PLENA VORTARO DE SAT

Kiel estas dirite en la raporto al la Kongreso, la kunlaborado inter la 4 aŭtoroj ne ĉiam okazis glate ĉe la komenco, ĉe la enreligo de la afero. Ankoraŭ nun okazas kelkfoje konfliktetoj. Pri ili, laŭ postulo de s-ro S. J. Grenkamp-Kornfeld, ni estas devigataj publikigi jenan parton el la Antaŭparolo, kiu difinos lian respondecon en la kunverkado.

Ni plie publikigas parton el letero adresita kune kun la teksto, pri kiu interkonsentis la 4 aŭtoroj k kiu pliklarigas ties signifon.

Direkcio de SAT.

"La laboro estis dividata inter la 4 kunlaborantojn jene: La Trio (s-roj E. Grosjean-Maupin, Esselin, Waringhien) prenis sur sin la taskon redakti la difinojn por ĉiuj oficialaj radikoj, plie por la radikoj neoficialaj, apartenantaj al la komuna lingvo kaj ankaŭ por la teknikaj radikoj neoficialaj apartenantaj al jenaj fakoj: lingvistiko, gramatiko, fonetiko, versfarado, literaturo, belartoj, historio, arkeologio, filozofio, religio.

"S-ro Grenkamp prilaboris ĉiujn teknikajn radikojn, kiuj ne estas oficialaj kaj kiuj ne apartenas al la ĉi supre cititaj fakoj. Krome, en la iom maloftaj okazoj, kiam oficiala radiko havas, flanke de sia ordinara komunlingva senco, alian fakan propre teknikan, oficiale ne sankciitan sencon, s-ro Grenkamp ankaŭ redaktis la difinojn de tiu ekskluzive teknika senco.

"Same kiel la Trio estas sole responda pri la parto, kiun ĝi verkis, same s-ro Grenkamp estas sole responda pri la parto, kiun li, sen ia kontrolo de la Trio, redaktis."

Por eviti estonte ĉiajn konfliktojn, estu ĝuste komprenate, ke pri tiuj ĉi eventualaj teknikaj kromaj sencoj de vortoj oficialaj, la aŭtoroj kaj ankaŭ s-ro Lanti interkonsentas, ke s-ro Grenkamp povos aldoni kroman teknikan sencon al la kutimaj komunlingvaj sencoj de iu oficiala vorto nur, se s-roj Esselin, Grosjean-Maupin, Lanti kaj Waringhien opinias prava tiun ĉi aldonon kaj enkondukon de nova senco kaj akceptos ĝin. En okazo de malkonsento la fina decido apartenos al s-ro E. Grosjean-Maupin.

ESPERANTO-SERVO DE SAT

Raporto pri funkciado dum la 2-a kvaronjaro 1929

La Centrejo de Esperanto-Servo en la 2-a kvaronjaro 1929 dissendis 63 raportojn, ricevitajn el 14 landoj: Anglio 5, Argentino 1, Bulgario 3, Estonio 4, Finnlando 1, Francio 1, Germanio 11, Jugoslavio 3, Latvio 1, Litovio 2, Nederlando 2, Polio 12, Rumanio 2, Sovetio 15.

Dum sama tempo aperis en la tutmonda gazetaro (laŭ resenditaj raportfolioj de 14 K-doj el 11 landoj!) raportoj el niaj bultenoj en 231 gazetnumeroj (ekskluzive tiuj, pri kiuj ni sube presigas specialan raporton el Leningrad).

Plej ofte aperis artikoloj pri la 9-a SAT-Kongreso, nome en 20 gazetoj (raportoj n-oj 64 k 145 po 10-foje). Sekvas: Laboro de rusaj elmigrintoj en Jugoslavio (31. — 10-foje); Premado kontraŭ la lab. junularo en Latvio (37. — 10-foje); Malsato k senlaboreco en Litovio (69. — 10-foje); Alvoko al tutmonda laboristaro — en Latvio oni mortbatas gelaboristojn — protestu! (122. — 10-foje); Vivo de la kamparana junularo en Germanio (9. — 9-foje); Fakto el Alĝerio (73. — 9-foje); Sklaveco en Bolivio (83. — 9-foje); Kulturaj atingoj en Sovetio (14. — 8-foje); Kontraŭrevoluciaj filmoj en Jugoslavio (30. — 8-foje); Kiel vivas infanoj en Bulg. (63. — 8-foje); Arestado de ukrainaj kamparanoj en Polio (124. — 8-foje); "Sano" de l' proleta infanaro en Polio (127. — 8-foje).

Rimarkinde estas, ke plej ofte aperintaj raportoj estis la plej koncizaj; nur kelkaj pli longaj, el blankaj aŭ koloniaj landoj, aperis pli ofte. Jen fakto, kiun ni ne malatentu, kiam la raportoj de nia Esp.-Servo (depost sekvanta n-o) aperos regule ĉiusemajne sur speciala paĝo en "S-ulo".

K-do Tilin-Leningrad sendis jenan raporton pri sia laboro dum aprilo-junio 1929: Estis utiligataj jenaj raportoj el Esp.-Servo: 111, 113, 115, 117, 119, 121, 122, 125, 126, 127, 128, 129, 132, 142, 145, 148, 151, 155, 158, 160, 166, 171, 173 — 23 tradukoj. Krome tradukitaj

---

KUN TIU ĈI NUMERO ESTAS EKSPEDATA "LA NOVA EPOKO"

leteroj, donitaj de apartaj labkoroj k grupoj: 29. Laŭ nia kutimo ĉio estas multobligita k disdonita al tuturbaj k entreprenejaj gazetoj k ĵurnaloj. Sume estas uzitaj: 1. en murgazetoj k laborejaj presgazetoj 685 tradukoj; 2. radie disaŭdigitaj 15; 3. en urba gazetaro 17; 4. en profunuiĝa gazetaro 52. Sekve sume la leningrada k leningradlanda laborularo legis 769 tradukojn. Priservitaj per niaj tradukoj estas 63 mur- k pres-laborejaj gazetoj.

Grava atentigo!

Depost sekvanta n-o de "S-ulo" aperos ĉiusemajne sur speciala paĝo la raportoj de Esp.-Servo, ĝis nun multobligite dissenditaj. Devo de ĉiuj Gek-doj, ne nur de la ĝisnunaj kunlaborantoj al Esp.-Servo, estas, liveri al la Centrejo de Esp.-Servo konvenajn raportojn pri ĉiaj okazintaĵoj en tuta mondo. Sed notu, ke tiuj raportoj nur devas enhavi faktojn; teoriaĵoj nepre estos forstrekitaj. Ju pli da Gek-doj aktive partoprenos, sendante raportojn al la Centrejo de Esp.-Servo, tradukante k donante la raportojn al redakcioj de la lab. gazetaro, des pli efika k sukcesplena estos nia peresp-a laboro. Senprokraste liveru taŭgan materialon al: Centrejo de Esperanto-Servo, Gerberstr. 24, Leipzig C 1 (Germanio).

Perforto kontraŭ SAT-anoj!

Kiam mi venis en mian naskiĝlokon (en Polio), polaj ĝendarmoj jam tre strabe rigardis al mi. Post kelkaj tagoj ili arestis min: Kaŭzo — mia internacia korespondado. En Polio ĉiam policistoj sidas en la poŝtejo, tiel ke neniu scias, ĉu estas poŝtejo aŭ policejo. K-doj gekorespondantoj, pardonu mian silenton. Mi skribos, kiam mi povos.

F. Grydzan.

FERVOJISTOJ, ATENTU!

Fervojistaj esperantistoj, venu al Knittelfeld (Supra Stirio), kie la fervojista fakgrupo de Wien aranĝos la 6-an de oktobro internacian renkontiĝon. La senkostan noktejon ni prizorgos, se vi ĝis la 25-a de septembro anoncos vin ĉe K-do J. Greitner, Ainbach I, Knittelfeld.

Transportlaboristoj kaj esperanto

La Internacia Transportlab. Federacio (Sidejo Amsterdam, Vondelstraat 61) intencas aperigi esp. eldonon de sia bulteno. Ĝi tiel turnas sin per speciala cirkulero al ĉiuj transportl. esp-istoj k esp. organizoj por helpo. Se tiu ĉi grava entrepreno estos kronita de sukceso, certe tio signifos gravan progreson por la plia disvastiĝo de nia movado, ĉar la Transportlab. Federacio estas unu el la plej grandaj lab. organizoj de la mondo. Sed la intencoj de la eldonontoj estas nur efektivigeblaj, se ili povos akiri minimume 1500 abonantojn. Tiam la abonprezo estus 2,50 guld. jare. (= 1 dolaro). La K-doj koncernataj, kiuj montras intereson pri la entrepreno, sendu informojn al supra adreso.

MEMORNOTO

Represis el "S-ulo":

Le Travailleur Alpin, Grenoble, 24. 8., Skribu al infanoj el Sovetio (251); Uj Elöre, N. Jorko, 19. 7., Giganta vilaĝo-urbo; Le Réveil Ouvrier, Nancy, 28. 8., Ford k Standard Oil; Itä ja Länsi, Helsinki, 15. 7., Blua trankvileco (225), Soveta Alasko, 15. 8., La minaco de Hindio (226).

Priesper. artik. k notojn enhavis:

Dresdner Volksztg., 30. 5., 21. 5., 3. 6., 31. 7., 6. 8.; Le Révail Ouvrier, Nancy, 24. 8.

Pri la SAT-Kongreso raportis:

Dresdner Volksztg., 14. 8. (Dresd. kunvenego), 27. 7., 5. 8., 10. 8.; Freie Sportwoche, Leipzig, 26. 8.; Työ, Viipuri, 27. 8.; Savon Työ, Kuopio, 24. 8.; Neue Ztg., München, Nordbayr. Volksztg., Nürnb., 27. 7., 22. 8.; Münchener Post, 20. 8.; Le Réveil Ouvrier, Nancy, 28. 8.

Peresper. materialon enpresis:

Dresdner Volksztg., 24. 4., 15. 6.; Le Travailleur Alpin, Grenoble, 17. 8., 24. 8.; Na Smine. Ĥarkov, 27. 8.; Infana Movado. Ĥarkov, junio (artik. de Eggers); Jargazeto de Kieva infanurbeto "Leninsk" (junio); Uj Elöre, N. Jorko, 25. 7.; 20. 7.; 28. 7.; Neue Ztg., Münch., Nordbayr. Volksztg., Nürnb., 1. 8., 20. 8., 23. 8., 31. 8.; L'Eclaireur de l'Ain, Oyonnac, 4. 8.

Korekta noto. La artikolo "La Kamentubo" en n-o 258 erare lokiĝis en la parton "Tra Esperantio". Ĝi devus troviĝi en la ĉefparto de la n-o. — En sama n-o, pĝ. 517, 2-a kol., lin. 15 de malsupre, legu "viv-nivelo" (anst. novelo).

NIA POŜTO

13 606. — Via artikolo estos uzata por la venonta n-o.

2474. — Via traduko estas sendita al "LNE".

12 028. — Ni uzos vian tradukon bonokaze. Sed prefere verku originalojn, kiel vi jam sukcese komencis.

10 746. — Via diskut-artikolo aperos.

Red.

K·O·R·E·S·P·O·N·D·A·D·O

Unu enpreso: Simpla trilinia anonco kostas 0,50 mk. g., ĉiu plia linio la samon. Ni nur akceptas anoncojn kun samtempa pago.
L = letero, PK = poŝtkarto, PI = poŝtkartoj ilustritaj, PM = poŝtmarkoj, bfl. = poŝtmarko sur bildflanko, kĉl. = kun ĉiuj landoj, esp-aĵo = esperantaĵo.
Ĉiuj petantoj pri korespondado havas la devon, nepre respondi almenaŭ unu fojon al ĉiuj petoj koncernantaj la fakon, por kiu ili sin enskribigis.

AŬSTRIO

K-dino A. Fiderer, Denisgasse 11/5, Wien XX, dez. koresp. en esp. k germana lingvoj kĉl. pri kulturaj, politikaj, pedagogiaj k virinaj temoj, interŝ. L, PI, gaz., kantojn, fotojn. Resp. garantiata.

BRITIO

— Adreso de 488 (London) estas ĝis junio 1930: Brookwood, Katonah, N. Y., Usono. — K-dinoj sendu artikolojn per "Lab. Woman" al K-dino Spiller, London.

ĈEĤOSLOVAKIO

K-do Jos. Haszzelka, Radvaszice, 249 ap. Ostrava, dez. koresp. kĉl., L, PI. Ĉiam k tuj resp.

FRANCIO

K-do H. Roig, Rue Dedieu, 36, Lyon-Villeurbanne, interŝ. PM, kĉl. Sendu almenaŭ 50 pec. el via lando k vi ricevos la saman kvanton.

K-do Auguste Flory, Munsterstr. 56, Hilsenheim/Elsass, dez. koresp. kun filatelistoj ĉl., precipe sovetiaj.

K-do Henri le Tutour, 45 Rue de Gand, Lille, dez. koresp. kun ekstereŭropaj Gek-doj pri ĉ. temoj, L, PI. Resp. garantiata.

Ĉiu SAT-ano nur unu karton aŭ leteron

sendu al ni, por ke sukcesu la unua ekspozicio en Gleiwitz (Supra Silezio). Rekompence vi ankaŭ ricevos post la ekspozicio PI. Agu tuj, ĉar la ekspozicio estos de 1. ĝis 8. de okt.

Adreso: K-do Skupin, Gleiwitz, Kalidastr. 13, Germanio.

GERMANIO

K-do Willi Neumann, Bautzener Str. 9, Weisswasser/Schlesien, dez. koresp. kun metalfacetistoj k naturamikoj, PK, PI, kĉl. Certe resp.

K-do Walter Neumann, Vogelsangstr. 66, Stuttgart, dez. interŝ. PI, bfl, il. gaz. Resp. garantiata.

— **Esp.-Propagandiloj** el ĉ. landoj k urboj dez. interŝ.: K-do Münz, Leipziger Str. 58, Berlin SW 19.

— 5 Gek-doj el progesinta kurso dez. koresp. kĉl. pri ĉ. temoj. Resp. garant. Skribu amase al K-dino: Liesbeth Otto, Manichswalder Str. 36, Crimmitschau i. Sa.

K-do H. Mauer, Hauptbahnhofstr. 6, Schweinfurt a. M., dez. koresp. kun kolegoj — aŭtomobilistoj pri profesiaj spertoj.

K-do Kurt Muschter, Karlsbader Str. 29, Buchholz i. Sa., dez. koresp. kĉl. pri facilaj temoj, PI, PK, L.

— **Gemuzikantoj por kordmuzikiloj atentu!** — Mi deziregas interrilati kun individuoj k tiaspecaj rondoj. Estas preferate: citro, gitaro k similaj. Adr.: K-do Paul Neubert, Rödlitz n-o 64, ap. Lichtenstein-C./Sa.

K-do Walter Nitzold, Brunnenweg, Sebnitz i. Sa., dez. koresp. kun anarkistaj Gek-doj ĉl.

Adresŝanĝo. — Gek-doj Falkenherr (13 563 k 10 084), Dortmund loĝas nun: Lüdinghauser Str. 27, Dortmund-Eving. — K-dino 13 563 dez. koresp. kĉl. pri ĉ. temoj.

— Juna fraŭlo (24 j.), dez. koresp. kun K-dinoj el ĉl., inteligenta. komprenas ankaŭ francan k anglan lingvojn. Nepre resp. Adr.: K-do Felix Hartmann, Bertastr. 12, Rheinhausen H'ch.

K-do W. Prenzler, Karlstr. 24, Forst (L.), dez. koresp. kĉl., Pl, L. PM, bfl.

K-do Paul Pozur, Zweigstr. 8, Oppeln, dez. interŝ. Pl. Resp. gar.

K-do Radziewski, Hüttenstr. 8, Hdbg.-Biskupitz, dez. koresp. kĉl., pri ĉ. temoj.

K-do Ernst Rauenbusch, Hubertshof, Elm b. Schlüchtern (Bez. Kassel), dez. koresp. kĉl., pri ĉ. temoj. Certe resp.

— Amika rondo de 8 K-doj dez. koresp. kĉl, pri div. lab. temoj. Resp. garantiata. Adr.: K-do Hans Scheuer, Damaschke-Anger-Str. 60, Frankfurt a. M.-Praunheim.

K-do Klimm, Stoberstr. 6, Kreuzburg O./S., dez. interŝ. Pl, k junulo 17 j. ankaŭ dez. koresp. kĉl.

K-do Skupin, Kalidastr. 13, Gleiwitz, dez. koresp. pri ĉ. temoj kĉl.

HISPANIO

K-do Andrés Mariano, str. Juegos Florales, 78, bajos, Barcelona (Sans), dez. interŝ. Pl kun ĉl. Gek-doj.

HUNGARIO

K-do Paŭlo Dohányos, Pest megye, Fó-ut. 10, Csepel dez. koresp. PK, Pl.

K-do Jozefo Stern, Szarvas-u. 32, Györ, dez. koresp. pri ĉ. temoj, kĉl., PK, Pl, PM. Resp. garantiata.

JUGOSLAVIO

K-dino Anka Jamnik, Trbonje p. Vnzenica, dez. koresp. kĉl., pri ĉ. temoj, Pl.

SOVETIO

K-do A. Tajnov, Furkasovski 1, kv. 41, Moskvo, Centro, dez. koresp. kĉl. Resp. garantiata.

K-do A. Krasikov, Troickosavsk, Burjat-resp. s. Uladyj, Siberio, dez. koresp. pri ĉ. temoj kĉl.

K-do Kurnaĉev, 3 Sokolniĉeska 8, kv. 3, Moskvo, 14, dez. koresp. kĉl. Resp. garantiata.

K-dino Marmolaev, Obŝĉie kvart. d. 9, St. Kirsanov, R. Ur. ĵ. d. dez. koresp. pri ĉ. temoj kĉl.

— Kollektiv LKSMB — Glavnie Gom. ĵel. dor. masterskie, St. Gomel, dez. koresp. kolektive kĉl. junularo.

K-do N. Melsitov, Artillerijska ul. Blagoveŝĉensk, Dvorki, dez. koresp. kĉl. div. temoj, interŝ. politikajn karikaturojn.

K-do Vengorcev, Knijni Sklad Centrosojuza, Marosejka 7/8, Moskvo, dez. koresp. pri ĉ. temoj kĉl.

K-do M. I. Gulnevskij, Abonementni jaŝĉik 4, P. O. Puŝkinskie-Gori, Pskov. okr., dez. koresp. pri fototelegrafio kaj televidado.

K-dino Mario Denisova, ul. Sverdlova 15, Livni, C. Ĉ. O., dez. koresp. kĉl. Pl, L.

K-dino V. Ponomarenko, Klub Lenina, Tajga, Siberio, dez. koresp. pri div. temoj, kĉl.

K-do Konstantino Ĉencov (librotenisto), Bajkalskaja, 44, Stalingrad, dez. koresp. kun Ameriko, Aŭstralio, Afriko k Azio. Resp. garant.

Adresŝanĝo. — K-do Nikolao Kulis informas siajn gekoresp-antojn pri nova adr.: Moskvo-64, Podsosenski per. 21.

K-do N. Nejfeld, str. K. Libkneĥta, 9, Romni, dez. koresp. pri ĉ. temoj kĉl., L, Pl. Resp. akurate.

K-do Samuelo Bregman (14 j., pioniro), Milicejskaja, 2, Tiflis, Kartvelio, dez. koresp. kun eksterl. geknaboj pri la temo: "Interesaj tagoj el lerneja vivo."

— Pionira taĉmento dez. koresp. kolektive kun gepioniroj de la tuta mondo. Adr.: K-dino Soboleva, Kooperativnaja ul. 9, Klin, Mosk. gub.

— Junkomunista ĉelo Kolektiv "KSM", Elektro-Stancia, Kremenĉug, dez. koresp. kun jun. kom. (individue k grupe) pri ĉ. temoj. Resp. garantiata.

— K-doj, ne forgesu al nia XII-a por la jubilea n-o sendi salutleterojn! — Arĥangelsk, Aleksandro Erjuĥin (9682).

SVEDIO

K-do Adolf Ŝvarz (SAT-ano 10 580) estas petata, sciigi sian adreson al Einar Norman, Stureg. 9, B., Malmö. — Gravas!

K-do A. Linzil, Skoghall, dez. interŝ. PM, kĉl.

Juna germana social-oficisto serĉas pro san-kaŭzo (sunbezono) por kelkaj monatoj restadon en suda Eŭropo. Bonvole skribu al Vili Schulze, Kardenapstr. 3, Gifhorn, Germanio.

Nun organizita

"Internacia Korespond-Oficejo"

ĉe redaktejo de Nord-Landa ĉiutaga jurnalo "PRAVDA SEVERA"

serĉas seriozajn kunlaborantojn.

Ĉiu esp-ista ĉelo, individua SAT-ano povas bone helpi al nia sukceso. Sendu al ni multnombre adr. de div. lab. organizoj, redaktejoj, segfabrikaj ĉeloj, sindikat-unuiĝoj, IRH-organizoj ktp. por reciproka koresp-ado kun samspecaj organizoj de la Nordo. Ne gravas, ĉu ili aplikas esp-on aŭ ne. Ni invitos ilin per aparta let. al kunlaborado.

Ni volas havi multe da eksterl. perantoj k konstantaj koresp-antoj. Interŝanĝo per artik., fotoj, presaĵoj — jen estas nia laboro.

Ĉiu presita artik. estos pagata.

Ni volas pruvi ke esp-o estas la plej viva k taŭga ilo por larĝa disvolviĝo de la intern. laboro.

Redakcio de "Pravda Severa", USSR, **Arĥangelsk,** poŝtkesto 20.

Jun-pionira Centra Klubo, Leningrad,

Volodarskij pr., 49, dez. korespondi kun junpioniroj, geknaboj kaj junularo, pri div. temoj, interŝ. fotojn, gaz., ktp. Resp. garant.

LABORISTA GRUPO "ANTAŬEN ĈIAM" aranĝas leterfeston por propagando la 13-an de oktobro. K-doj sendu multnombre. Tiel ni pruvos ĉe la skeptikuloj, ke esperanto ne estas plu utopio.

Ĉiu let. k PK estos certe respondataj. Kun danko. Adreso: Esp. lab. grupo **"Antaŭen ĉiam"**, fako de Juventud, Tarrasense San Francisco 52, **Tarrasa,** Hispanio.

GEKAMARADOJN

niajn k novajn korespondemulojn mi petas skribi pri temoj: laborista, junulara, ruĝskolta, kleriga, sporta movadoj; vivo, salajro, amuzoj, ankaŭ serioza lingvo-perfektiĝo. Multaj niaj kursoj garantias al ĉiuj respondojn. Adr.: EDZ-sekretario **B. Czechowski.** Pollando, **Sosnowiec,** Koseielna "La Ornamo".

Gek-doj el ĉiuj landoj aŭskultu!

Je la 12.—13. oktobro 1929 en Chemnitz okazos "Ruĝa distrikt-renkontiĝo" kontraŭ faŝismon kaj malsatdiktaĵon". La tutmonda proletaro devas kunprotesti kaj pro tio sendu salutlet. el ĉiuj landoj (de organizoj k individuoj) por la renkontiĝo al K-do Alfr. Müller, **Chemnitz,** Germ., Fürstenstr. 38/I. Ni certe respondos!

K-do Ja Timmers nun ne plu loĝas en la amezonestrato 57, sed nun Hasebroekstrato 51, **Den Haag (Nederl.)**

Gek-doj el ĉiuj landoj aŭskultu!

Arĥangelsk, lasis oficon de librotenisto de la ŝparkaso k foriris labori en lokan redakcion "PRAVDA SEVERA" (Vero de l' Nordo), por gvidi Internacian Korespond-Fakon, organizitan ekskluzive per esp-o, k sekve plene okupi sin je nia idea kampo. Bonvolu sendi nun ĉiujn poŝtaĵojn laŭ jena nova adr.: USSR, **Arĥangelsk,** poŝtkesto 20, Esperanto.

ENHAVO:

	pago
Kio estas la IWW?	537—38
Alia "Sakko-Vanceti"-afero en Usono	538—39
Du pioniroj forpasis el la mondo	539
El la historio de l' Socialismo . .	539—40
Amo kaj amindumo	540
Enhav-Tabelo	541—43
Sennaciula Liberpensula Paĝo . .	544
Tra Esperantio	545—47
Korespondado, Anoncoj	547—48

Presejo: Peuvag. Druckerei-Filiale Leipzig (Germanio)